

LA LAGUNA - TENERIFE
14an - 19an julio 1991

51-a HISPANA
KONGRESO DE
ESPERANTO



KONGRESA LIBRO



LA ESPERO

En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
perflugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion;
al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj,
sed dissaltos la obstinaj baroj
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de l' homaro
por eterna ben' efektiviĝos.

L. L. Zamenhof



HONORA PREZIDANTECO

Sia Reĝidina Moŝto Doña Elena

Afable akceptis la Honoran Prezidantecon de la
51-a Hispana Kongreso de Esperanto

SALUTO DE LA URBESTRO DE LA LAGUNA

Alproksimiĝante jam la duonjarmilo de ĉi tiu urbo San Cristóbal de La Laguna, la geesperantistoj de la tuta Hispanujo, kune kun reprezentantoj alilandaj, decidis kunveni ĝuste ĉi tie, nun je la dua fojo, do antaŭ precize 22 jaroj, en julio 1969 ili celebris sian 29an jubilean renkontiĝon en La Laguna.

Atingas nin la novaĵo, ke ĉi tiu Kongreso signifas, krom plukonstato pri la riĉeco de Esperanto kiel internacia lingvo kaj interkomunikilo kiu posedas altan kaj nediskuteblan praktican valoron, omaĝon al D-ro Juan Régulo Pérez, Adopta Filo de nia urbo, omaĝo al kiu ni aliĝas konvinkitaj pri la meritoj kiuj personiĝas en la omaĝoto kaj ankaŭ en la esperantista movado.

Ni salutas ĉiujn partoprenantojn en la 51a Hispana Kongreso de Esperanto, kore ni bonvenigas ilin kaj ankaŭ deziras feliĉan restadon en La Laguna al ĉiuj. Rilate la Kongreson ni aŭguras fruktodonan kaj sukcesan disvolviĝon.

JOSÉ SEGURA CLAVELL
Urbestro de La Laguna

SALUDO DEL ALCALDE DE LA LAGUNA

Próximo ya el medio milenio de esta ciudad de San Cristóbal de La Laguna, los esperantistas de todos los rincones de España, junto a representantes de otros países, han decidido reunirse aquí, precisamente, ahora por segunda vez, pues hace exactamente 22 años, en julio de 1969 celebraron ya este jubileo esperantista en La Laguna.

Nos llega la noticia de que este Congreso significa, además de una reafirmación de la riqueza del Esperanto como lengua internacional e instrumento para la intercomunicación que posee un alto e indiscutible valor práctico, un homenaje al Dr. D. Juan Régulo Pérez, Hijo Adoptivo de nuestra ciudad, homenaje al que nos sumamos convencidos de los méritos que reúne la persona homenajeada y el propio movimiento esperantista.

Saludamos a todos los participantes del 51 Congreso Español de Esperanto, cordialmente les damos la bienvenida y deseamos una feliz estancia en La Laguna para todos. Para el Congreso auguramos un fructífero y exitoso desarrollo.

JOSÉ SEGURA CLAVELL
Alcalde de La Laguna



ESTU BONVENAJ

Mi volas esprimi mian plej koran saluton de la Insulo Tenerife al la partoprenantoj en la 51-a Hispana Kongreso de Esperanto kaj deziri al vi la plej bonan el la restadoj kaj la plej grandan profiton en viaj laboroj.

Tenerife estas akceptema lando, sincere gastama al multnombre abundaj vizitantoj kiujn ĝi ricevas ĉiujare, ĉar ĝi estas unu el la turismaj vintrumejoj plej gravaj en Eŭropo. Tiu cirkonstanco transformis la insulon je aperta kaj kosmopolita loko, kie kunvivas la tuta ĥaosa gamo da eŭropaj lingvoj. Kiel en kiu ajn turisma centro internacia, ni konstruas, do, unu el la multnombraj "Babelturoj" kiuj dise staras tra la mondo.

Kontraŭ tiu universala konfuzaĵo, la geesperantistoj luktadas deantaŭlonge, kun la konvinko ke, tiom necesas la hejmaj lingvoj kiom universala lingvaĵo kiu unuigu ĉiujn homojn.

Tiu belega laboro fratiga pere de la lingvo havadis en Kanarjoj kaj en Hispanjo unuarangan defendanton. Don Juan Régulo Pérez, unu el niaj plej elstaraj humanistoj, ricevos de la esperantista komunumo la justan omaĝon, al kiu la Insula Konsilantaro de Tenerife aliĝas. Lia travivado estas tiu de imitinda sciencisto kaj tiu de aktiva kaj batalanta trenanto de la Esperantista Movado.

Al vi kiuj nin vizitas, mi deziras que via restado en Tenerife estu dumviva sperto en via lukto por disvastigo de Esperanto kaj bela memoraĵo en tiu loko de la memoro kie ĉiuj ni gardas la plej neforgeseblajn travivaĵojn.

ADÁN MARTÍN MENIS

Prezidanto de la Konsilantaro de Tenerife

BIENVENIDOS

Quiero expresar el más cordial saludo de la Isla de Tenerife a los participantes en el 51 Congreso Español de Esperanto y desearles la mejor de las estancias y el mayor provecho en sus trabajos.

Tenerife es tierra de acogida, de franca hospitalidad a la gran cantidad de visitantes que recibe cada año, por ser uno de los enclaves de turismo invernal más importantes de Europa. Esa circunstancia nos ha convertido en un lugar cosmopolita y abierto, donde convive toda la abigarrada gama de lenguas europeas. Como cualquier centro turístico internacional, somos, por lo tanto, una de las múltiples «torres de babel» que se esparcen por el mundo.

Contra esa confusión universal, los esperantistas vienen luchando desde hace mucho tiempo, desde el convencimiento de que tan necesarias son las lenguas vernáculas como un lenguaje universal que una a todos los hombres.

Esta hermosa labor de hermanamiento a través de la lengua ha tenido en Canarias y en España un valedor de primera fila. Don Juan Régulo Pérez, uno de nuestros más destacados humanistas, va a recibir el justo homenaje de la comunidad esperantista, al que el Cabildo Insular de Tenerife quiere adherirse. Su trayectoria es la de un científico ejemplar y la de un activo y beligerante impulsor del movimiento esperantista.

A los que nos visitan, les deseo que su permanencia en Tenerife sea un hito inolvidable en su lucha por extender el esperanto y un bello recuerdo en ese lugar de la memoria donde guardamos las experiencias más inolvidables.



ADÁN MARTÍN MENIS
Presidente del Cabildo de Tenerife

La Universidad de La Laguna no puede dejar pasar la ocasión de apoyar y de saludar con calor la iniciativa de celebrar en La Laguna el Congreso Español de Esperanto. El desarrollo de esta lengua viva debe ser preocupación fundamental de una institución como la nuestra.

Como bien saben los que se mueven en torno al esperanto, la Universidad de La Laguna y, sobre todo, dos eminentes profesores de esta casa, ha sido decidida impulsora en la programación y el estudio del esperanto. Me refiero al Dr. D. Jesús Maynar, rector que fue de esta Universidad, persona de entrañable memoria, y al Dr. D. Juan Régulo, esperantista de reconocida talla a nivel internacional, fino editor y polígrafo inestimable.

Ojalá que, al calor de nuestra institución, el esperanto siga su marcha ascendente y contribuya al acercamiento entre diferentes culturas. Esa es su misión humanista a la que la Universidad prestará todo su posible apoyo.

MARISA TEJEDOR

Rectora de la Universidad de La Laguna

Un poco más de un siglo hace ya que el oculista, Dr. Zamenhof construyó su proyecto de lengua que posteriormente sería conocida con el nombre de esperanto. Parece evidente, incluso para un desconocedor, que esta lengua internacional no se ha quedado en estado fósil, sino que ha crecido y progresado incesantemente. La prueba es que en la actualidad es hablada por más de tres millones de esperantófonos, repartidos en más de 100 países, con numerosas publicaciones de todo tipo, enseñada en muchas universidades e instituciones superiores. En Francia, incluso, el esperanto está oficialmente admitido por el Ministerio de Educación como actividad socioeducativa. Parece claro, pues, que esta lengua está viva y sigue penetrando en el tejido social. Su vitalidad, como siempre, dependerá de cómo la rieguen sus cultivadores y los estudiosos.


La Universidad de La Laguna agradece a los organizadores de este Congreso Español de Esperanto la colaboración solicitada y, desde luego, no puede dejar pasar la ocasión de recordar que en el seno de nuestra Casa dos profesores entregaron muchas horas de su vida y de su saber a la difusión calurosa del esperanto. Me refiero al decidido apoyo de D. Jesús Maynar, rector que fue de esta Universidad de La Laguna y, como no, al Dr. D. Juan Régulo, esperantista temprano, quién venció toda clase de dificultades, económicas y otras, para llevar adelante, infatigablemente, la hermosa tarea de extender el cultivo de una lengua. La prueba es el libro-homenaje

que nuestra Universidad le dedicó y uno de cuyos volúmenes está formado por una serie de ensayos esperantistas que ha tenido repercusión internacional.

El Vicerrectorado de Extensión Universitaria, en su afán de divulgar la cultura, hace votos por el éxito de este Congreso Español de Esperanto. En la medida de nuestras posibilidades, siempre prestaremos nuestro apoyo a iniciativas de este tipo.

ANTONIO ALVAREZ DE LA ROSA

Vicerrector de Extensión Universitaria



INVITO AL KONGRESO

La Laguna, Eldonejo Stafeto, Prof. D-ro D. Juan Régulo Pérez! Jen vortoj magiaj kaj fierigaj por ĉiu uzanto de Esperanto: En tiu epoko, plej malfacila, post la lasta mondmilito, jen potenca lumturo ne nur helpis al pluvivado de la lingvo, sed eĉ pligravigis ĝin dum jaroj per longa prezentado de verkoj kun altaj niveloj aŭtora, editora, eldonista... kaj, krome, metis en niajn korojn kaj mensojn tian ondon de optimismo kaj laboremo kiu daŭre floras inter ni.

Dum nia Kongreso en La Laguna ni povos plian fojon kaj unubloke admiri la imponan vicon da verkoj eldonitaj en Esperanto de Prof. Régulo. Kaj ili konsistigas plej valoran laŭrokronon por la vivolonga agado, konfirmitan de tiu Serta Gratulatoria, tiu gratulgirlando al kiu tiom da elstaraj homoj de plej diversaj landoj kontribuis.

Sed ni ne restu ĉe la nura konsiderado de la valora rezulto. Ni antaŭ ĉio pensu, admiru kaj danku la grandegajn oferojn familiajn, financajn (por modesta ekonomio!), la enormajn kvantojn da talento, da tempo, da laboro, da penado postulatajn de tia tasko -kiu trudis eĉ preteratenton al la propra kariero.

Jen tial kazo, en kiu la kortuŝa latina-hispana esprimo benemérito, do, bonmerita estas plenrajte meritata de Prof. Régulo Pérez kaj de lia familio, kaj jen kial ĝi estas danke kaj admire aplikata de ni ĉiuj al ili, por agnosto de tiu multo de ili oferita por la kulturo, por la reciproka kono de homoj diverskulturaj, por la bono de la Homaro.

Ni nun kongresas en La Laguna kun unu ĉefa celo: publike kaj kolektive esprimi nian omaĝon kaj dankon al tiuj amataj personoj. Kaj ni volas tion fari laŭ la vojo montrata de la agado de Prof. Régulo, nome, per kultura laboro. Jen tial la Unua Lirika Festo de niaj Kongresoj (al kiuj kontribuas niaj junaj valoroj kune kun aŭtoroj ŝuldantaj al Stafeto la publikigon de iliaj verkoj) kaj ankaŭ la oficiala prezento de la projekto pri Preuniversitataj Kursoj en Esperanto.

Nia Kongreso prezentas do plurajn trajtojn gravajn por ni ĉiuj. Nome de la Estraro kaj de la Kongresa Komitato, ankaŭ propranome, mi deziras al ĉiuj kongresanoj la personan kaj kulturen pliriĉigon, kiun nia Kongreso en La Laguna ebligas.

ANTONIO ALONSO NÚÑEZ

Prezidanto de HEF

SALUTO DE LA PREZIDANTO DE L.O.K.

Jam alvenis momento, samtempe tiel timiga kiel dezirata.-
Nia sabl-horloĝo lasis fali lastajn sablerojn! Atingis nin, preskaŭ fulme, la "51-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO" kaj sia Internacia Omaĝo al P-ro Juan Regulo Pérez, elstarega esperantisto, kiuj okazos en la Granda Salono de la Universitato. Ankaŭ okazos livero de la premio "Klara Silbernik" al sia edzino, pri kiu li diris: «al mi ŝi multe apogis kaj pri mi ŝi multe laboras»

Ni havos multe da taskoj. Por ekvilibri agadon oni aranĝis tiujn Unuajn Lirikajn Festojn kaj vere kulturajn ekskursojn. Junaj kaj lertaj montgrimpistoj supreniros la monton Teide per piede, rigardante vulkanajn ŝtonojn kaj mirindan pejzaĝon. Tiuj ne tiel junaj, per busa ekskurso, vizitos la "Centro de Vizitantoj" ĉe "El Portillo de la Villa", en "Las Cañadas" (Pr. El Portiljo de la Vilja, en Las Canjadas = "La Pordeto de la Urbo, en "La Valetoj"); ĝi estos scienca ekskurso dum kiu oni prezentos porturisman Videobendon, faritan de ICONA (Instituto pri Natur-konservado) kaj esperantigita de nia Societo. Tiu video estos ekde nun oficiala por ĝin montri al turistoj el ĉiuj landoj.

Poste ni vizitos la Botanikan Ĝardenon de "La Orotava" kaj fine ni inaŭguros etan monumenton kiu kuŝas en ronda placeto de la urbo Puerto de La Cruz, ĉe "Avenida de Colón". Tiu monolito montras bronzan tabulon okaze de la "51-a Hispana Kongreso de Esperanto" honore de nia komuna Internacia Lingvo Esperanto. Ĝi estas donaco de tiu turisma Urbodomo.

Kiel Prezidanto mi dankas al LOK-anoj siaj klopodoj por atingi sukceson; mi scias ke kelkaj el ili preskaŭ forgesis familion, eĉ ankaŭ freneziĝis laborante akurate kaj rapide pro tiu Kongreso. Zamenhof, ĉe la senkorpa Fortego Mistera, persone dankos tion. Aliaj anoj preferis ne ŝviti, prenante pomojn laŭfale. Anstataŭ "unu mondo, unu lingvo, unu homaro", eble ili pensas kiel diris Nicolás Estévez y Murphy:

«...Mia patrolando estas de migdalarbo
dolĉa, freŝa, neforgesebla ombro».

Tiu historia kongreso donos al ni oportunecon por fari novajn amikojn, revivigi malnovajn amikecojn, kaj kunvivi dum okazas unu el la plej bone meritaj omaĝoj pri kiu ni scias: al tiu emerita profesoro, modela homo kaj elstara esperantisto, kiu tiom da ingenta laboro faris por Esperantismo. La Serta Gratulatoria estas Universitata rekono. Tiu de la 51-a Kongreso, pere de sia Omaĝo Internacia, estos vere "Certa Gratulatoria" kiun ĉiu esperantisto subskribas honore al Don Juan Regulo Pérez, kara majstro kaj amiko.

FRANCISCO J. DAVILA DORTA

Prezidanto de LOK



El Oksfordo, Anglio, mi sendas salutojn al la 51-a Hispana Kongreso de Esperanto, kaj miajn varmajn bondezirojn por ĝia brila sukceso.

Mi malofte tiel profunde bedaŭris, ke mi ne ĉeestos ian eventon: malavara invito trafis min nur kiam mi jam estis promesinta prelegi aliloke samdate. Misfortune! Miaj pensoj tamen ofte flugos al La Laguna.

Sed kial mi, kiu jam ĉeestis 18 grandiozajn Universalajn Kongresojn kaj multajn aliajn esperantajn kongresojn kaj festivalojn, tiel sopiras al hispana kongreso en La Laguna?

Nu, jes; mi dum jaroj iom deziris viziti Tenerife, jes. Sed mi dezirus ĉeesti guste vian kongreson, ĉar oni informis min, ke ĝi celas speciale omaĝi kaj honori profesoron Juan Régulo Pérez. Tiun omaĝon mi nepre deziras partopreni.

Aliaj detaligos liajn vastajn servojn al Esperanto: liajn erudiciajn esplorojn; liajn longajn servojn en la Akademio; multajn kulturajn kaj klerigajn laborojn; precipe lian unike kuraĝan, longedaŭran, kulturaman servadon per sia elstara eldonejo Stafeto, kiu

en sia epoko nemezureble riĉigis nian kulturon. Sed mi volas omaĝi unu el la plej fidelaj, lojalaj, paciencaj, helpemaj kaj malavaraj amikoj, kiujn mi iam ajn trovis.

Juan Régulo fidis mian talenton kaj eldonis mian unuan esperantan libron Kontralte en 1955; kaj aliajn poste. Ĉiam pri eldonistaj aferoj li estis modelo de ĝentila konduto. Sed tiu kvazaŭ profesia rilato rapide evoluis en veran amikecon. En mia iom ŝtorma kaj ne ĉiam saĝa emocia vivo, tiu tute platona rilato estis io konsola, subtena, trankviliga. Juan, kiu mem suferis nekompareble pli ol mi -eĉ en malliberejo de diktatoro -tre bone konas mian pli neŭrozan flankon, kaj estis pri ĝi tre pacienca kaj komprenema. Tro longa estus mia katalogo de liaj helpaj agoj malavaraĵ: donacoj al mi kaj al bibliotekoj aŭ malriĉaj esperantistoj pro miaj petoj; kuraĝigo al lernantoj; dumkongresaj regaloj; inteligentaj konsoloj... Li kelkfoje estis en mia hejmo ege ĉarma kaj ĝentila gasto; eĉ toleris la impertinentajn petolojn de miaj katoj. Post lia konstanta helpo kaj kuraĝigo kiel eldonisto, plej dankinda, por mi, estas kredeble lia helpo dufoje en la iomete famaj intensaj esperantaj kursoj en la Wedgwood Memorial College, Barlaston, kiujn mi direktis, kaj kie li estis tre ŝatata gastpreleganto. De tiu aranĝo li malprofitis finance; en tiun aranĝon li ĵetis sin tute entuziasme, plene serveme, adaptiĝeme kaj kun fantazio kaj simpatio. Trezora estas mia memoro pri li, kiam li aktoritis tie kiel polic-inspektoro Obeu Regulon -firma sed bonkora, kaj tute policaneca!

Mi dankas lin por ĉio. La hispana kongreso omaĝos lin; sed la hispanaj esperantistoj povas certi, ke Juan Régulo estas ne nur konata, sed estimata kaj amata, en multaj landoj.

Laste, mi el plena koro deziras al li kiel eble plej grandan pliboniĝon de la sanstato. Aŭdinte pri lia kuraĝo, mi preferus aŭdi pri lia feliĉo.

Marjorie Boulton

SALUTO AL LA 51-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Karaj Kongresanoj, Permesu al mi, kiel iama Prezidanto de la Esperanta Akademio, gratuli vin pro la elekto de La Laguna kiel sidloko por via Kongreso, kaj esprimi al vi kaj al Prof. Dro. Juan Régulo, mian profundan bedaŭron, ke la pezo de naŭdek jaroj malhelpas min akompani vin en ĉi tiu pilgrimo, jes, pilgrimo al ĉi tiu sankta loko. Ĉar el ĉiuj urboj, kiuj ĝis hodiaŭ gastigis Esperantan, landan aŭ universalan, Kongreson, La Laguna estas la sola, kiu tiel intime partoprenis en la vivo de Esperanto, ke ĝi fariĝis dum longaj jaroj la centro de la Esperanta literaturo kaj la standardo de la Esperanta kulturo; kaj tion ĝi ŝuldas al la senlaca, giganta agado de Juan Régulo. Tion la urbaj institucioj rekonis titolante lin "Adopta Filo" de la urbo, donante lian nomon al unu el siaj placoj, kaj efike helpante sian Universitaton al la eldonado de la majesta monumento al lia glorado: la Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo (t. e. en nia lingvo: Krono da gratulaĵoj honore al J. R.). Des pli valorplena estas por ni tia atestaĵo, ke la dua el la tri volumoj, kiuj ĝin konsistigas, estas tute dediĉita al "Esperantismo". Mi esperis, ke ĝustatempe kun via Kongreso, okazos alia honorigo al Juan Régulo, t. e. la apero de liaj originalaĵoj kolektitaj en unu dika volumo "Rikolto"; sed malgraŭ la penado de liaj amikoj –inter kiuj mi fieras kalkuliĝi– la verko ne estas ankoraŭ finpresita. Sed mi volas esperi, ke la fizika stato kaj la spirita energio de nia kara Celebrato ebligos al li baldaŭ preni en siajn manojn kaj ĝui per siaj okuloj la tiel atendatan libron, kiu spegulas lian vivdaŭran celadon al la Esperanta humanismo.

Prof. G. Waringhien

REGULOJ DE REGULO

Estas noble, ke la 51a Hispana Kongreso de Esperanto ĉi-jare venas al La Laguna por omaĝi profesoron Juan Régulo Pérez, la plej grandan eldoniston en la historio de la Internacia Lingvo. Ne estas bele, ke tiu omaĝo prokrastiĝis ĝis nun, ĉar la meritoj de Régulo estis klaraj jam antaŭ kvarona jarcento. Tiam ankaw Régulo mem estus povinta simple kunĝui la kongreson, kion li nun ne plu kapblas fari. Sed, tia malatento estas ofta en nia Movado. Feliĉe, la urbo de Régulo agis pli rapide: jam de pluraj jaroj La Laguna havas placon kun la nomo "Plaza Doctor Juan Régulo Pérez".

La kontribuo de Régulo al la Esperanta kulturo estas grandega, unu el la plej grandaj, kiujn unuopa homo faris kaj povis fari. Eldoni 93 titolojn estas en si mem giganta tasko. Eldoni ilin en la tempo, kiam ne ekzistis la nunaj komputilaj eldonfacilaĵoj, kiam necesis mane komposti ĉiun unuopan literon, tio estas apenaw kredebla.

En alia okazo mi aparte emfazis la eldonpolitikon de Régulo (vidu en la revuo "Esperanto", decembro 1989, p.201). Tiu eldonpolitiko (kiun mi trovas supera al tiu de Literatura Mondo) kaj la teknikaj normoj de la libroj sub la ŝildo "Stafeto" kreis regulojn por la Esperanta eldonarto. Tion mi nomas "reguloj de Régulo", kaj ni nun dawre revenas, kaj devos revenadi, al la Stafeto-volumoj por kompare kontroli, ĉu niaj novaj libroj havas ĉion, kion bone eldonita libro devus havi. Régulo restas majstro sur tiu tereno.

Por iom gaji en la fino (kun provo gajigi Régulon mem!), mi nun memoras tiun malnovan, kliŝan kaj iom banalan demandon de bulvarda ĵurnalisto: "Se vi estus ekzilita al soleca insulo, kiujn tri librojn vi kunportus?" Nu, Régulo ĉiam similis por mi al homo, kiu forgesis kunporti tiujn tri librojn. Ĉar li forgesis, li decidis mem krei ilin sur la "soleca insulo". Li kreis ne 3, sed 93!

Komence de aprilo ĉi-jare, mi feris dum semajno en Tenerife. Mi intence elektis la insulon, ĉar mi volis viziti la malsanan amikon Régulo. Ni faris tiun agrablan viziton. Mi volas fari ĝin denove en aprilo de la venonta jaro. En ĉi tiu nekutima maniero mi volas mesaĝi al Régulo, ke li fartu bone kaj atendu min.

Simo Milojević

HONORA KOMITATO

Excmo. Sr. Presidente del Gobierno de Canarias

Ilmo. Sr. Alcalde del Excmo. Ayuntamiento de La Laguna

Ilmo. Sr. Presidente del Excmo. Cabildo Insular de Tenerife

Magca. y Excma. Sra. Rectora de la Universidad de La Laguna

Excmo. Sr. Consejero de Educación, Cultura y Deportes del
Gobierno de Canarias

Ilmo. Sr. Vicerrector de Extensión Universitaria de la
Universidad de La Laguna

Ilmo. Sr. Alcalde del Excmo. Ayuntamiento de
Puerto de la Cruz

LOKA ORGANIZA KOMITATO

Prezidanto:	Francisco José Dávila Dorta
Sekretario:	Antonio Ferrer Hervás
Kasisto:	Antonio Benítez Hernández
Generalaj Aferoj:	Leandro Trujillo Casañas
Loghado:	José Palmero Pérez
Vochdonantoj:	
	1-a Aurelio Solís Pi
	2-a Isabel Perdomo-Machín Hernández
	3-a Antonio Suárez Rodríguez
	4-a Juan Martín Hernández
	5-a Jorge García de La Cuesta
Helpantoj:	
	Víctor Hugo García Henríquez
	Antonio Sánchez Pérez
	José Luis García

PREZIDANTOJ DE E.S.T.O.

José Roberto Vivas	1957
Angel Pombrol Hernández	1957-1959
Juan Régulo Pérez	1959-1961 (1967-1969)
Nicolás Pérez Alvarez	1961-1963
Ramón Rodríguez Peña	1963-1965
Manuel Manteca López	1965-1967 (1973-1975)
Antonio Ferrer Hervás	1969-1971 (1977-1979)
Antonio Suárez Rodríguez	1971-1973 (1979-1981)
Leandro Trujillo Casañas	1975-1977
José Palmero Pérez	1981-1983
Juan Martín Hernández	1983-1985
Jorge García de La Cuesta	1985-1987
Carmen Rodríguez Hernández	1987-1989
Francisco J. Dávila Dorta	1989-1991

HONORAJ MEMBROJ

Juan Régulo Pérez
Angel Pombrol Hernández
Vicente Pérez Torres
Ramón Rodríguez Peña

ELSTARAJ APOGANTOJ

La Loka Organiza Komitato esprimas sian dankon al la sekvantaj institucioj kiuj altanime kunlaboris por la organizado de l' Kongreso:

Dirección Territorial de Educación

Centro de Enseñanzas Integradas

Residencia Escolar “Pedro García Cabrera”

Caja General de Ahorros de Canarias

Centro Ecológico de La Laguna

Jardín Botánico del Puerto de la Cruz

U.R.E. y A.R.I.C.

Cruz Roja de La Laguna

Asociación Musical UNUM COR

Coral Universitaria de La Laguna

Agrupación Folklórica Los Majuelos

ELSTARAJ APOGANTOJ

La Loka Organiza Komitato ne povas forgesi sian dankon al la sekvantaj personoj kiuj apogis nin en niaj celoj:

Excmo. Sr. D. Miguel Angel García Barbuzano

D. Elfidio Alonso Quintero

D. José Luis Sánchez Pérez

D. Antonio Ortiz Hernández

Sres. Párrocos de: Santo Domingo, La Concepción,
N. S. de Los Remedios, Santa Iglesia Catedral

Superior de la Comunidad Franciscana del Santísimo Cristo de
La Laguna

D. Adrián Alemán de Armas

D. Alfredo Kraus Trujillo

D. Francisco González Luis

Doña Carmen Cruz Simó

D. Eloy Díaz de la Barreda

D. Eliseo Izquierdo Pérez

D. Manuel Díaz Febles

D. Jorge Dávila Viera

D. Juan Antonio Pérez Giralda

HISPANAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

NºJARO	KONGRESURBO	NºJARO	KONGRESURBO
1 1920	BARCELONA	26 1965	PALENCIA
2 1921	ZARAGOZA	27 1966	BILBAO
3 1923	VALENCIA	28 1967	ZARAGOZA
4 1924	BILBAO	29 1969	LA LAGUNA
5 1925	CORDOBA	30 1970	MIERES
6 1926	MADRID	31 1971	ALICANTE
7 1928	SEVILLA	32 1972	VIGO
8 1929	OVIEDO	33 1973	MADRID
9 1930	MADRID	34 1974	VALLADOLID
10 1933	SANTANDER	35 1975	LERIDA
11 1936	BARCELONA	36 1976	EL FERROL
12 1951	TARRASA	37 1977	SABADELL
13 1952	VALENCIA	38 1978	LEON
14 1953	BILBAO	39 1979	GIJON
15 1954	ZARAGOZA	40 1980	MADRID
16 1955	GIJON	41 1981	MURCIA
17 1956	BARCELONA	42 1982	MALAGA
18 1957	MADRID	43 1983	ZARAGOZA
19 1958	CASTELLON	44 1984	SEVILLA
20 1959	MALAGA	45 1985	CARTAGENA
21 1960	PONTEVEDRA	46 1986	VIGO
22 1961	PALMA DE MALLORCA	47 1987	MADRID
23 1962	VALLADOLID	48 1988	VALENCIA
24 1963	BARCELONA	49 1989	BILBAO
25 1964	VALENCIA	50 1990	SANT CUGAT

51 1991 LA LAGUNA

KONGRESA PROGRAMO

TAGO 1-A. DIMANCHO 14-A

KIAM	KIO	KIE	KIU
08.30	Matenmangho	Manghosalono	
09.30	Gichetoj malfermitaj	Kongresejo	A. Ferrer
10.30	Interkona mateno	Kongresejo	
11.45	Diservo	Salono Zamenhof	Pastro
12.30	Frua Tagmangho	Manghosalono	
13.00/ 16.00	Regiona Folkloro Festo honore al Sankta Benedikto en la urbo	En la urbo	
16.00	Malfermo de Libroservo	Librejo	J. L. García
16.30	Malfermo Radio ED8ESP	Radiejo	URE/ARIC
16.30	Privataj kunsidoj	Aŭloj Régulo/Vivas	HEF, KTP.
17.30	Unua Kolokvo Gramatika	Salono Zamenhof	Aurelio Solís
19.00	Libertempo		
20.00	Vespermangho	Manghosalono	
21.30	Nokta Lirika Festo: Prezento	Salono Zamenhof	M. Fernández

TAGO 2-A. LUNDO 15-A

KIAM	KIO	KIE	KIU
08.30	Matenmanĝo	Manghosalono	
09.30	Libertempo		
10.00	Promeno ĝhis Universitato		
10.00	Kongresprezento al Medioj	Paranimfa Halo	HEF/LOK
11.00	Ricevado de Aŭtoritataj	Paranimfo	
11.30	Solena Malfermo Prezento de la Kongreso Vortoj de Aŭtoritatoj Malfermo kaj Omagho Laŭdaj Vortoj Livero Premio Klara Silbernik Khoraj Kantoj	Paranimfo	HEF Prezidanto kaj Aŭtoritatoj
13.00	Promeno ĝhis Kongresejo		
13.30	Tagmanĝo	Manghosalono	
16.00	Video kun prelego pri Azia Esperanto Movado	Salono Zamenhof	Antonio Sánchez
17.30	Esperanto Kurso 1	Aŭlo Vivas	Año
17.30	Inauguro de Retrospektiva Fotoekspozicio Esperantista	Ekspoziciejo	Leandro Trujillo
18.00	Prelego pri Mérida	Salono Zamenhof	F. Cabezas
19.30	Libertempo		
20.00	Vespermangho	Manghosalono	
21.30	Nokta Lirika Festo: 1-a Sesio	Salono Zamenhof	M. Fernández

TAGO 3-A. MARDO 16-A

KIAM	KIO	KIE	KIU
08.30	Matenmangho	Manghosalono	
09.30	Ghenerala Ordinara Kunsido	Salono Zamenhof	HEF
11.00	Esperanto Kurso 2	Aûlo Vivas	Añó
11.30	Eksterordinara Asembleo de HEF	Salono Zamenhof	HEF
13.30	Tagmangho	Manghosalono	
16.00	Ghenerala Provo	Salono Zamenhof	M. Fernández
16.00	Internacia Esperanto Turismo	Aûlo Régulo	Andrzej Grzebowski
17.00	Esperanto Kurso 3	Aûlo Vivas	Añó
17.30	Vespera eliro por montgrimpi Tejden	Kongresejo	C. Ferrer
17.30	Nokta Lirika Festo: 2-a Sesio Verda Stelo Asociación Musical Unum Cor Coral Universitria de La Laguna	Salono Zamenhof	Liceo de Madrid Luis Correa Carlos Brito
20.00	Vespermangho	Manghosalono	
21.30	Frua enlitigo		

TAGO 4-A. MERKREDO 17-A

KIAM	KIO	KIE	KIU
08.15	Matenmangho	Manghosalono	
09.00	Eliro Tuttagan Ekskurson: Nacia Parko "Las Cañadas del Teide" "La Caldera" Botanika Ghardeno "Complejo Martiánez"	Kongresejo	Alighintoj
20.30	Reveno al Kongresejo		

TAGO 5-A. JHAŬDO 18-A

KIAM	KIO	KIE	KIU
08.30	Matenmangho	Manghosalono	
09.30	Informo/debato Somerkurso	Salono Zamenhof	A. Alonso
10.30	Ghenerala provo	Salono Zamenhof	M. Fernández
10.30	Esperanto Kurso 4	Aŭlo Vivas	Añó
11.00	Informo pri Univ. Kongreso	Aŭlo Régulo	A. Casquero
11.30	Prezentado de novaj libroj	Aŭlo Vivas	M. Fernández
12.00	Elparolo "Subjektiva vidado de La Laguna"	Salono Zamenhof	Prof. A. Alemán
13.30	Tagmangho	Manghosalono	
16.00	Ekzamenoj ILEI	Aŭlo Régulo	ILEI
16.45	Promena vizito en la urbon	Kongresejo	Víctor
20.00	Vespermangho	Manghosalono	
21.30	Nokta Lirika Festo: 3-a Sesio Grupo Amalgama	Salono Zamenhof	M. Fernández Carlos Dyass

TAGO 6-A. VENDREDO 19-A

KIAM	KIO	KIE	KIU
08.30	Matenmangho	Manghosalono	
09.30	Fakaj kunsidoj	Aŭloj Régulo/Vivas	Fakuloj
10.30	Informo pri Radiokursoj	Salono Zamenhof	
11.00	Invito al Mérida Kongreso	Salono Zamenhof	Mérida Grupo
12.00	Prelego "La Gramatiko de Anchieta"	Salono Zamenhof	Prof. Francisco González Luis
12.30	Fermo de la Radiostacio	Radiejo	URE/ARIC
12.45	Fermo de Libroservo	Librejo	J. L. García
13.30	Tagmangho	Manghosalono	
15.30	Solena Fermo	Salono Zamenhof	HEF k. a.
18.30	Veturado al Kazino Taoro	Puerto de la Cruz	Víctor II. García
19.30	Oficiala Bankedo	Casino Taoro	
21.30	Amalgama kaj Los Majuelos	Casino Taoro	
22.00	Reveno al Kongresejo		



ASOCIACIÓN MUSICAL UNUM COR

I. B. Viera y Clavijo

PROGRAMO

Eco	M. Praetorius
Music for Queen Mary II:	
<i>Marcha, Canzona, Himno, Marcha</i>	H. Purcell
May The God of Whit Inspire:	
<i>(The Fairy Queen), Preludio, Trio, Echo</i>	H. Purcell
Chi in Dio sol spera	W. A. Mozart
Ave Maria	Petrovich
Salve Montserratina	A. Nicolau
La Noche (Khora Poemo Atlantika)	J. J. Falcón
Arroró (Kanaria lulkanto)	J. J. Falcón
Salmor	
<i>a) Arando (Canto del güeyero)</i>	
<i>b) El vivo</i>	C. A. Cedrés
<i>Direktoro: Luis Correa Díaz</i>	



CORAL UNIVERSITARIA DE LA LAGUNA
RENE SANCA POLIFONIO

PROGRAMO

Now is the month of maying	Thomas Morley (1558-1603)
April is in my mistress face	Thomas Morley (1558-1603)
Fair Phyllis I saw	John Former (1565-1605?)
Amor vittorioso	Giovanni Gastoldi (1550-1622)
Bonzorno Madonna	Antonio Scandelli (1517-1580)
Chi la gagliarda	Baltassare Donato (1530?-1603)
Sur la verdure	Clemens Non Papa (1510-1556?)
Mon Marie va à la taverne	Anonima
Gaudeamus igitur	Universitata Himno
<i>Direktoro: Juan Ignacio Oliva Cruz</i>	



ASOCIACIÓN CULTURAL GRUPO FOLKLÓRICO LOS MAJUELOS

Tiu Folkloro Grupo kantas por la kongresanoj diversajn folklorajn kantesprimojn de nia Kanaria Insularo: *Isas, Folías, Seguidillas, ktp.*, kaj Premieron de la muzika verko de valencia Majstro Félix Navarro Clemente *Ho, mia kor'*.

Direckoro pri muziko: Francisco Díaz

Direktoro pri danco: José Suárez

VERDA STELO

Khoro de la Liceo de Madrid

Direckoro: P. Vilaroig

AMALGAMA

Muzika Grupo de Tenerife

Direckoro: Carlos Dyass

KANARIAJ INSULOJ

Kanariaj Insuloj, navigantaj sur fantazia fabelmaro, freŝaere ventumataj, ĉiellazure plafonitaj kaj enhavantaj grandiozan, mirravan vegetaĵaron; tiuj insuloj kronataj de altegaj montopintoj, plenplenaj de raraj pejzaĝoj, kun gigantaj krateroj kaj mondfamaj valoj, estis, jam de antikvaj tempoj, prestiĝe nimbataj de poetoj, historiistoj kaj marveturantoj.

Nuntempe iliaj loĝantoj ne estas tiel feliĉaj kiel dum la pratempa mitepoko. En la nuna erao, la insuloj jam ne estas plu ĉe la misteralloga mondfino. Sed ĉar iliaj prestiĝo kaj nimbo estas ankoraŭ retorika figuro, jen, je ĝentila invito de samideano Engolm, kvar bildoj pri la Kanaria Arĥipelago.

Mito

Ekde la praaj tempoj, la homoj sopiris je mondo pli feliĉa ol tiu ĉi mizera, kie oni vivas. Dudek jarcentoj da kristanismo instruis, ke tiu mondo estas akirebla nur en la postmorta ekzisto. Sed homo de la antaŭkristana tempo kredis, ke ĝi estas surtera, sed ege, ege malproksima, en iuj insuloj tre okcidente, ĉe la mondfino, ie nedefinite trans la Heraklaj Kolonoj.

Jam la Odiseado parolas pri la Elizeo, lando kie loĝas la herooj, en eterna printempo, post la morto. Sed estas Hesíodos, kiu unua alnomis ĝin per la bela esprimo de Beatulaj Insuloj. Tiuj insuloj fabele navigadis okcidenten, ĉiam okcidenten. Kaj Pythéas, jam dum la kvara jarcento antaŭ Kristo, ĉarme priskribis paradizan

oceanan landon, kiun li vizitis. De tiu epoko, sur tiu kadro de realo, oni ornamis la okcidentajn insulojn oceanajn per la elizeaj rakontoj eposaj. Kaj dum la militaj periodoj, la menso de la homoj sopiris pri la Feliĉaj Insuloj. Tiel sin esprimis Píndaros unue, Pláton poste, en Helenujo; kaj en la roma mondo ili estis por Plautus Insulae Fortunatorum, por Sallustius Insulae Fortunatae t.c. 'Feliĉaj Insuloj', kaj poste Arva Beata por Horatius.

Fakte, en la malproksima okcidento, estas certaj insuloj, kiuj respondas al la priskriboj de la poetoj. Ili estas la Kanariaj Insuloj. Ilin konis la fenicaj navigantoj, la sudhispanaj pramaristoj, la grekaj vojaĝantoj, kaj eĉ Sertorius mem vizitis ilin. Nordafrikaj antaŭarabaj blankaj homoj ekloĝis tiun landon en nebula pratempo; mezepokaj araboj enregistris la insularon sur siaj maparoj kaj en siaj priskribaj verkoj, kaj katalunoj desegnis la unuajn sciencajn geografiajn kartojn, frue, komence de la 14a jarcento. Sed, malgraŭ tio, la insuloj daŭre diktis sian lecionon de rava malproksimo. Ĉar, antaŭe, malproksime en la tempo, kiam ŝipdirektilo kaj preciza marvetura karto estis nekonataj, kiam ankoraŭ la insuloj ne estis enirintaj la geografion kaj la historion, ili sukcese estis atingintaj kategorion de mito. Tio okazis dum la klasika or-epoko, kiam ĉiuj estaĵoj ŝvebe glitis en malproksima sorĉravo. Tiam homoj kaj agoj akiris mitsignifon. Kaj iĝi mita estas iĝi eterna. Por Kanariaj Insuloj feliĉe okazis tiu evento. De tiam ili mite vojaĝas tra la mondaj horizontoj. Kaj ili mit-eĉe vojaĝos, tiel longe dum homoj estos kapablaj je ravo kaj fabelo...

Lando

La Kanaria Arĥipelago konsistas el sep insuloj kaj sep neloĝataj insuletoj. Nomoj kaj ordo de la insuloj laŭ graveco estas: Tenerife, Gran Canaria, La Palma, Lanzarote, La Gomera, Fuerteventura, El Hierro. Ampleksas la insularo proksimume 7.670 kvadratajn kilometrojn; loĝas tie pli ol 1.500.000 homoj. La

Arĥipelago, en la zono de mildaj ventoj kaj varmetaj marfluoj, konas nek krudan vintron nek rigoran someron. Ĉe la marbordo nur tre malofte oni registras temperaturojn sub la grado 10 aŭ super 28 de la termometro centgrada.

Post la konkero, kiu daŭris la tutan 14an jarcenton, la indiĝenoj miksiĝis kun la konkerintoj tiel intime, ke jam en la unuaj jardekoj de la 16a jarcento estis tute neeble distingi konkerintojn disde konkeritoj. Kaj tiamaniere la lando tiel funde enradikiĝinta en la menso de la klasikuloj rapidege transformis sian literaturan lokon je komerca krucpunkto inter la mondoj malnova kaj nova. Ŝipoj de Sudafriko, de Nederlanda Hindujo, de Aŭstralio, ŝipoj de Eŭropo kaj Ameriko ornamas la insular-havenojn per siaj multkoloraj flagoj.

La klimaton boneco faciligas kreskadon de multaj vegetaĵaj specoj sur la antikva mitlando. Sed, paralele, originaj vegetaĵoj fariĝas mondfamaj. Inter tiuj elstaras unualoke tre uzita likeno, la *Lichen Roccella tinctoria* Lin. Ĝi kreskas sur krutegaj montoj, inter rokfendaĵoj, sur la bordoj de altaj ravinoj. El ĝi oni eltiris tre riĉajn tinkturojn. Pro tiu vegetaĵo la Arĥipelago nomiĝis 'Purpuraj Insuloj' jam dum la antikvaj tempoj. Sed la moderna farbindustrio senvalorigis la ekspluaton de tiu likeno.

Alia fama indiĝena arbo estas tiu nomata Drago, la *Dracaena draco* Lin. de la botanikistoj. Ĝi kreskas grandioze, sed ege malrapide. La aĝo de la plej famaj ekzempleroj, ankoraŭ nun vivantaj, kalkuliĝas je miljaroj. Antaŭ ili jarcentoj estas kiel jaroj antaŭ homoj. Laŭ botanikistoj, en la insuloj estas dragoj pli aĝaj, ol la homeraj eposoj, samtempaj al la faraonoj kaj la egipta civilizo. El tiu arbo oni eltiris, iel simile kiel oni eltiras kaŭĉukon, elastan gumon, ore valoran en klasika farmakopeo. Nun restas nur la arboj, kiuj kreskas spontane en la insuloj. Sed ĝia 'sango', kiel oni nomis la eltiritan gumon, ne estas plu uzata.

Inter la vegetaĵoj de aliaj regionoj nun vaste kulturataj en la insularo, troviĝas la sukerkano, kiu el la arĥipelago pasis al

Ameriko; la vito, kies vinoj tre famigis la insulojn dum la jarcentoj 17a kaj 18a en Francujo kaj Anglujo; kaj fine la bananoj kaj la tomatoj, kiuj estas la ĉefaj nunaj riĉefontoj de la regiono. Ankaŭ kulturiĝas terpomoj, ciuspecaj cerealoj, tabako, ktp, kaj kreskas spontane palmoj, nopaloj, pinoj, agavoj, erikoj, ktp.

La faŭno ne estas malpli riĉa. Sed la insulojn famigis, unue, la kocenilo, abunde vivanta sur la nopaloj, kies utiligo daŭris grandskale ĝis la unua mondmilito; la alia besteto estas la birdo, kiun oni nomas kiel la insulojn mem: kanario. Ankaŭ riĉe abundas la fiŝado.

La insuloj estas plenaj de vulkankrateroj. En La Palma estas la plej granda kratero de la mondo: ĝia cirkaŭo mezuras 28 000 metrojn, kaj en ĝia interno, grandioza valo, vivas homoj kaj kreskas abunda vegetaĵaro konsistanta el pinoj, fagoj, erikoj, ktp. En insulo Tenerife leviĝas la monto Teide 3.718 metrojn super la marnivelo; vintre ĝi estas neĝokovrita, sed, ĉar la klimato estas tiel dolĉa ĉe la marbordo, okazas, ke oni povas skiveturi kaj marbaniĝi dum la sama tago. Sed la kanarianoj, tre bonaj naĝantoj, estas iom rifuzemaj je neĝosportoj. Hodiaŭ la vulkanoj ne estas aktivaj. Nur tiam kaj tiam la monto Teide fumetas.

Kanarianoj estas blankaj homoj. Negroj estas tiel maloftaj, kiel en kiu ajn mezeŭropa lando. Plej granda parto el la insulanoj neniam vidis negron. Dum la jarcentoj 16a kaj 17a oni envenigis kelkajn, kiel sklavojn, por la sukerindustrio. Sed ili dissolviĝis definitive en la loĝantaro jam antaŭ longe. La indiĝenoj, je la konkerepoko, estis altaj, blankaj, blondaj homoj, kun lingvoj parencaj al tiuj de la blankaj nordafrikaj prapopoloj.

Kaj tiuj ĉi estas kelkaj el la plej karakterizaj geografiaĵoj de la regiono. La kadro estas blua oceano kaj blua ĉielo. La naturo estas belega, grandioza. Se ne estus la homo, oni vere povus pensi pri la Elizeo.

Historio

Kanariaj Insuloj ekeniris la geografion kaj la historion dum la 14a jarcento. Hispanoj kaj portugaloj disputis pri ilia posedo. Ĉe la fino de la 15a jarcento finiĝis la konkero, ĝuste en 1496. De tiam la arĥipelago apartenas al Hispanujo.

Antaŭe la insuloj estis nebule konataj. Nur la araboj kaj maŭroj vizitis ilin dum la mezepoko. Jam estis en ili loĝantoj. Kaj marokaj piratoj atakadis ilin por akiri sklavojn. Ĉar kelkaj el tiuj sklavoj lernis la araban lingvon kaj rakontis al siaj posedantoj sian vivmanieron sur la insuloj, ni povas hodiaŭ iom scii pri tiu praa pasinto. La unuan mención certan pri la Arĥipelago oni legas en Plinius, sed ĝi estas tre konfuza kaj, kelkloke, eĉ kontestebla.

Tuj post la eltrovo Kanariaj Insuloj estis ambiciataj de ĉiuj maraj imperioj. Portugaloj kaj hispanoj interkonsentis pri la hispana posedo. La amerika eltrovinto riparis la direktilon de unu el siaj velŝipoj en la insulo Gran Canaria. Sed la deziro de aliaj maraj imperioj pri la insuloj multe suferigis la insulanojn. Anglaj, francaj kaj nederlandaj piratoj kaperis la hispanajn ŝipojn kaj atakadis la insulojn. Plurfoje la formiĝantaj urbetoj estis fajre detruataj. Drake mem atakis la insularon, sed senrezulte. Ankoraŭ ĉe la fino de la 18a jarcento la angla admiralo Nelson intencis invadi la insulojn. Kontraŭ Santa Cruz de Tenerife li atakis. En tiu batalo li perdis brakon, kaj li ne sukcesis.

Krom tio, la forgeso estas la trajto historia plej elstara. Kanariaj Insuloj estis sensignifaj, nekonata angulo. Nur maristoj kaj vojaĝemaj scienculoj sciis iom pri ili. Dum la napoleonaj militoj, ili estis internejo por francaj militkaptitoj. Tie, malproksime sur la maro, forgesite...

Nuno

En la 20a jarcento, la Feliĉaj Insuloj estas retorika figuro. Eĉ la naturo mem estas malpli grandioza, ĉar la sukerkana industrio, en serĉo de ligno por la hejtado, kalvigis montojn kaj valojn. Tamen io restas el la pasinta impono kaj gloro, ĉar naturo spitas eĉ homon.

La insuloj havas nuntempe gravajn urbojn: Las Palmas de Gran Canaria, Santa Cruz de Tenerife kaj La Laguna. Elektro kaj ŝoseoj, ŝipoj kaj aeroplanoj rapidigas la vivon. Eĉ granda petrolrafinado malbeligas la pejzaĝon sude de Santa Cruz de Tenerife.

Kulturcentro estas la malnova sinjoreca urbo La Laguna, en la insulo Tenerife. Ĝi havas universitaton kun tradicio pli ol centjara. Tiu universitato nun estas unuaranga inter la ĉefaj en Hispanujo, tiel laŭ la nombro da studentoj kiel laŭ la graveco de la studobjektoj kaj scienca kaj humanisma investigado. Krome estas tie ankaŭ la plej antikva ŝtata gimnazio de la regiono. En La Laguna estas same la katolikreligia ĉefloko, kun episkopejo, seminario, monaĥ- kaj monaĥinejoj, ktp. Militafera ĉefurbo estas Santa Cruz de Tenerife, kaj juĝafera centro estas Las Palmas de Gran Canaria. Ekde 1926 Kanariaj Insuloj formas du hispanajn provincojn.

Hodiaŭ la mondo estas malgranda. Tiel Kanariaj Insuloj estas parto el tiu malgrando. Radio, kino, gazetoj, novaj ideoj kaj aspiroj skuas la animojn de la insulanoj tie ĉi egale kiel en Madrido, Berno aŭ Helsinko. La moderna vivo rapidege glatigas ĉiujn regionajn apartaĵojn. La glatigilo de la nuntempo kuntrenas ankaŭ la Felicahjn Insulojn...

Ni esperu, ke tiu kunteno ne forportu la ĝisnunan memsufiĉon de la insularaj geografia medio kaj spirita atmosfero!

Kiel la Kanariaj Insuloj eniris la historion

En la nuna stato de la studoj, kiuj celas klarigi la problemon de la kanaria prahistorio, oni povas aserti, ke la insuloj estis loĝataj jam en la tempo de la eŭropa ŝtonepoko. La tiutempaj loĝantoj estis homoj etnologie parencaj al tiuj de la Cro-Magnona raso. De tiu epoko kulturaj elementoj de mediteranea deveno atingis la insulojn. La nuna geologio neas la malnovan hipotezon, laŭ kiu la insuloj iam estis unuigitaj kun Afriko. Ilia origino estas submaraj vulkanoj pratempaj. La unuaj loĝantoj necese devis alveni de trans la maro, kvankam ili poste forgesis navigacion kaj restis sen komunikilo kun la kontinento kaj inter la insuloj mem. Poste la insuloj ricevis semidajn enmigrantojn kaj kun ili iliajn kulturojn, kiuj radikiĝis sur ĉiuj insuloj laŭ malsamaj procentoj.

La rasmikso estis ĝenerala. El ĝi estiĝis popolo paŝtista kun tre rudimenta agrikulturo, sur la okcidentaj insuloj ĉefe grotloĝantoj, sur la orientaj, pli da homoj kun malgrandaj vilaĝoj el domoj konstruitaj per ŝtonoj, sen mortero.

La mezepokaj eŭropanoj trovis tie vivanta altan ŝtonepokan kulturon. La regada (politika) organizo estis de tipo genta aŭ triba, simila al malgrandaj monarkioj. El vortoj kaj frazoj postlasitaj al ni de samepokaj kronikistoj la kompara lingvoscienco konkludas, ke la lingvo, kvankam dialekte aparta sur ĉiu insulo, estis parenca al la nunaj lingvo kaj dialektoj berberaj. Nuntempe arkeologoj kaj etnologoj fervore laboras pri antikvaj restadejoj, objektoj kaj malnovaj literaturaj mencioj por lumigi la pasintecon de la insularo, pasintecon, kiu tuŝas la kulturhistorion ankaŭ de praaj eŭropaj kaj nordafrikaj rasoj.

La renesancaj humanistoj kaj multaj postaj sciencaj esplorantoj supozis -kelkaj eĉ nuntempe supozas- ke la Elizeaj Kampoj, la Ĝardeno de la Hesperidoj kaj Atlantiso estis mitoj forĝitaj per sciigoj, kiujn la klasikaj popoloj kaj aŭtoroj ricevis el la insuloj aŭ pri ili. Kaj ili penis akordigi tiujn notojn de la klasika literaturo

kun la geografiaj cirkonstancoj, kiujn fakte havas la insuloj. Sed tio estis vana peno. La Feliĉaj Insuloj de la klasikaj aŭtoroj neniam estis reale la nunaj Kanariaj Insuloj. Tiu nomo de la insularo vere estas nur posta retorika figuro.

La klasikuloj tamen ne malkonis la insularon. Plutarkos citas konkrete en sia biografio pri Sertorius kelkajn insulojn, kiuj tre verŝajne estas la orientaj Kanariaj Insuloj. Eble vizitis ilin ankaŭ la marveturantaj kartaganoj kun Hanon. La geografo Satiŭs Sebosus konis ilian ekziston, kaj Plinius postlasis al ni resumon -kvankam konfuzan- pri la vizito al la insularo farita laŭ ordono de la maŭritania reĝo Iuba. Ankaŭ la aleksandriaj geografoj mencias ilin, kaj Ptolemeios fiksas la unuan meridianon ĉe la plej okcidenta el la insuloj, hodiaŭ nomata El Hierro.

La marvetura tekniko, kiu dum jarcentoj malrapide perfektigis en Mediteraneo, atingis gravajn rezultojn jam en la 12a jarcento. Krom la kompas venis la ŝipdirektilo. Tiu anstataŭas la flankan remilon por direkti la ŝipon, permesas pliigi la tunkvanton kaj la grandon de mastoj kaj veloj kaj ebligas direkti la ŝipon kun sekureco ĝis tiam nekonata. La naviganto konas siajn vojojn. Li povas reiri sur ili, kiam li volas. Jam ne plu ripetigas la okazo, ke maristo, kiu atingas nekonatajn bordojn, ne scias reiri al la elirpunkto. La kompas ebligas al la maristo veturi malproksime de la bordoj. Tio ne estis ebla por malnovtempaj direktistoj. Ili ne povis determini, kie sur la maro ili estas, se ili ne havis antaŭ la okuloj iun punkton por estigi rilaton.

La maristoj de Mediteraneo baldaŭ proprigis al si kaj uzis tiun novan teknikon marveturan. Ili desegnis la unuajn mezepokajn markartojn kun la atlantikaj bordoj kaj havenoj. Sur tiuj kartoj troviĝas la Kanariaj Insuloj, kvankam ne ĉiam samnombre. Ili estis insuloj foje vidataj, foje forgesitaj dum la lastaj mezepokaj jarcentoj. Sed la genovano Lancelotto Malocelle komence de la 14a jarcento sukcesis atingi tiun insulon, kiu laŭ li hodiaŭ nomiĝas Lanzarote. Karton de tiu insulo desegnis en 1339 unuafoje la

kataluna geografo-desegnisto Angelino Dulcert. Sur la insulo li desegnis ankaŭ la blazonajn insignojn de la Genova respubliko, kiuj fariĝis stereotipa gablono por preskaŭ ĉiuj mezepokaj karto de tiu ĉi mondparto. La karto de Dulcert havas ankaŭ aliajn insulojn, inter ili la misteran Sanktan Brandanon (Insula Sancti Brandani), efian enkorpiĝon de nordeŭropa legendo ĉerpita el la mezepoka ravmita geografio.

Portugalujo komencas fari tieajn akirojn dank' al la nova tekniko. Genovanoj kaj florencanoj komencas servi al Portugalujo. Kelkaj el ili atingas eĉ admiralan rangon de tiu lando. La unuan konatan rakonton pri vizito al Kanariaj Insuloj faris en 1341 la florencano Nocoloso da Recco en leteroj, kiujn li el Sevilla sendis al sia patrujo. Ankoraŭ en la 14a jarcento katalunoj kaj majorkanoj (el Mallorca), edukitaj en la misia spirito propra al la patrujo de Raymond Llull, ripetas la vojaĝon al Kanariaj Insuloj. Post ili venas portugaloj kaj hispanoj el la atlantikaj havenoj, ekzemple la biskajano Martín Ruiz de Avendaño kaj Gonzalo Pérez Martel el Sevilla, veraj piratoj, kies sola celo estis havigi al si indiĝenojn kiel sklavojn.

En la jaro 1344 la papo Klemento 6a donis la suverenecon super la insuloj kun la titolo Princo de Fortuno al Don Luis de Hispanujo, pranepo de la hispana reĝo Alfonso 10a. Tiam regis en Kastilujo Alfonso 11a kaj en Aragono Pedro 4a, ĉe kiuj la princo petis helpon por sia konkera ekspedicio. La princo ne sukcesis ĝin efektiviĝi; sed kun tiu peno rilatiĝas la vojaĝoj de katalunoj kaj majorkanoj tra la 14a jarcento.

Je la komenco de la 15a jarcento du normandaj kavaliroj, Jean de Béthencourt kaj Gadifer de la Salle, komencas la aventuran konkeron de la insuloj. Tiu vojaĝo ŝajnas ĉapitro el kavalira romano, viva enkorpiĝo de la mezepoka kavalira spirito. Ili eliras el la franca haveno La Rochelle kaj konkeras la insulojn Lanzarote, Fuerteventura kaj El Hierro. La hispana reĝo Enrique 3a rekonis la rajton de tiuj unuaj konkerantoj kaj metis ilin feŭde sub

sian protekton. En tia stato komenciĝas la rivaleco pri la insuloj. La papa kortego havas intereson pri misiaj agoj. Portugaloj sub la reĝo Don Henriko la Naviganto ofte faris ekspediciojn al la insuloj, ĉefe al La Gomera. Nevo de la konkerinto Béthencourt vendas la jam konkeritajn insulojn al hispana andaluzia nobelo, Grafo de Niebla. Post pluraj intertraktoj pri la insuloj suriras la hispanan tronon la Katolikaj Gereĝoj* Don Fernando kaj Doña Isabel. En tiu epoko plifortiĝis la reĝa potenco en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj. Tiu politiko atingas ankaŭ la Kanariajn Insulojn, kaj la hispanaj Gereĝoj subternas la feŭdajn nobelojn de la malpli gravaj insuloj kaj prenas por si la du cefajn insulojn, Gran Canaria kaj Tenerife. Tio okazis ĉirkaŭ 1477.

La Katolikaj Gereĝoj Fernando kaj Isabel intencis fari el la insuloj hispanan provincon. Por tio ili daŭrigis la konkeron per pacaj procedoj, farante packontraktojn kun la indiĝenoj. Sed paralele ili uzis ankaŭ militajn rimedojn por subigi kontraŭstarantojn, kiuj rifuĝis en montarojn kaj sovaĝajn lokojn de la insuloj. La konkero de Gran Canaria okazis per rekta kaj komuna faro de la Rubikona Episkopo (Episcopus Rubicensis, titolo de la unuaj episkopoj de la unua episkopejo de la insularo, sur la insulo Lanzarote) kaj la Gereĝoj. La konkero de Tenerife kaj La Palma inaŭguris sistemon de privata iniciato sub oficiala protekto -- sistemo poste tre uzata dum la konkero de Ameriko.

La konkero de Gran Canaria komenciĝis en 1483. Trupoj sub komando de episkopa oficiro kaj sub fakta gvido de gereĝaj profesiaj militistoj kontraktis kaj luktis kun la indiĝenoj ĝis 1485. Kiam tiu afero estis preta, la episkopo kaj la civila estraro de la novkonkerita insulo planis militakiri insulon La Palma. Por la konkero de tiu insulo multe helpis indiĝena sklavino el La Palma mem, Franciska la Palmanino, kiu sukcesis kristanigi kvin insulajn tribestrojn. Dank' al tio la konkero de La Palma fariĝis sekura. Alonso Fernández de Lugo entreprenis almliton de Tenerife. Kiel sur la aliaj insuloj ankaŭ tie ĉi parto de la indiĝenoj estis amika al

la konkerantoj kaj same estis parto kontraŭstara. Fernández de Lugo suferis kelkajn tre gravajn malvenkojn. Sed por tre primitiva popolo, kiu en tiu insulo ne konis eĉ agrikulturon, ne estis ebla sukcesa kontraŭstaro. En la somero 1496 Fernández de Lugo proklamis plenan subigon de Tenerife.

Tiu ago finis la kokeron de la Kanaria Insularo, kaj per ĝi la insularo eniris la historion. La mistere allogaj Feliĉaj Insuloj jam ĉesis esti geografia kimerio. Kun la krepusko de la mezepoko krepuskiĝas ankaŭ ĝiaj ravimagoj kaj fabeloj, kun la finiĝo de mezepoko mortas ankaŭ la mita tradicio heredita de la klasikuloj. Hai tòn makáron nêsoj de la grekoj, Arva Beata de la latinoj, la Beatulaj aŭ Feliĉaj Insuloj de la postaj literaturoj fariĝas retorika figuro. La humanistaj klopodoj por revivigi tiujn insulojn kaj trovi ilian lokon en la Kanaria Insularo estis vanaj.

Sed ne ĉio finiĝis. Ankaŭ la historia epoko trempigis multajn plumojn, novaj famoj leviĝis. Tiuj famoj tamen havis firman bazon en la realo. En la historia epoko famigas la insulojn farbolikenoj, vegetaĵaj gumoj, vinoj, kocenilo ktp. En niaj tagoj la nomo de la insularo kuniĝas kun insularaj tomatoj, bananoj, milda klimato. Sed pri tio mi skribos alian fojon.

* Mi skribas Katolikaj Gereĝoj, ĉar per la edziĝo de Fernando, reĝo de Aragono, kaj Isabel, reĝino de Kastilujo, estis kreata la hispana nacia unuiĝo. Post la edziĝo ĉiu restis reĝo en sia propra lando, kvankam fakte ambaŭ egale kunregis ambaŭ reĝolandojn. La vorto "katolikaj" estas titolo donita de la papo al tiuj Gereĝoj. Per tiu titolo oni ĉiam citas ilin en hispanaj libroj pri historio kaj literaturo.

ESPERANTO EN KANARIOJ

Unuaj esperantistoj, pri kiuj ni havas fidindajn sciigojn, estis, ĉirkaŭ 1905, Angel Rodríguez Alvarez, profesoro en la Instruista Seminario de Las Palmas kaj aŭtoro de la ĝis antaŭ ne longe fama popollerneja libro *Rayas*, kaj Luis Alvarado, direktoro de la sama Seminario.

La unua esperantista societo de Kanarioj estis fondita en Santa Cruz de Tenerife, en 1907; ĝia prezidanto estis Juan Cambreleng Uque. La sola postsigno kiun ni havas pri ĝi estas kurioza poŝtkarto sendita la 30an de oktobro 1909, kies historion ni rakontetas ĉe faksimila reproduktaĵo. Dank' al propagando farita en 1910-1912 de makleristo Heriberto Díaz Santana, en 1913 estis laŭleĝe aprobita la starigo de Grupo Esperantista de Tenerife, kiun prezidis S-ro Díaz. Sed same kiel la societo de 1907, ĉi tiu de 1913 ne estigis pozitivajn rezultaĵojn.

En 1908 fondiĝas en La Laguna rondo por propagandi kaj instrui Esperanton, prezidata de portugalo Sebastiao dos Santos Ferreira; sed malgraŭ disdono de flugfolioj, alvoko per afiŝoj kaj organizo de kelkaj dancofestoj en sia sidejo, strato Alamos, ankaŭ ĝi ne sukcesis enradikigi la aferon.

Samjare, telegrafisto José del Castillo y Pez, de Telde (Gran Canaria), konigis la lingvon al komercisto Felipe Suárez Falcón, kiu poste rolis tre aktive en la esperantista vivo de Las Palmas. En 1915 estis fondita Centro Esperantista de Las Palmas, dank' al kiu okazis multaj kursoj ĝis 1936, kaj eĉ unu strato de tiu



urbo ricevis la nomon «Esperanto» (dum nia civilmilito anstataŭgita je nomo de generalo). Inter la kursogvidantoj estas menciindaj, krom la nomita S-ro Suárez, ŝtata oficisto Antonio Llinás Bellvehí kaj makleristo José Báez Báez.

En La Palma unue propagandis Esperanton kapitano Antonio Pérez Linares, en lernejo, kiun li posedis en strato Zarza (nun Fernández Ferraz); kelkaj liaj lernantoj aĉetis lernolibrojn, sed kiam en 1910 S-ro Pérez forlasis la insulon, neniu plu okupiĝis pri Esperanto ĝis 1929, kiam venis al Santa Cruz de La Palma instruisto Antonio de Juan Torres, dank' al kies agado estis fondita en 1931 Esperanto-grupo sub la nomo Espero, kun sidejo en strato San Telmo. En 1932 aperis, sed nur surpapere, Kanaria Esperantista Federacio, ankaŭ en Santa Cruz de La Palma, kies prezidanto estis masonisto Víctor Ferraz Armas.

Studento Juan Régulo Pérez, inicita de S-ro de Juan en 1932, gvidis poste, en 1933 kaj 1934, kursojn en Tazacorte (La Palma), kie li ekdeĵoris kiel popollerneja instruisto.

En 1935 aperas en Las Palmas la unua gazeto kun esperanto-teksto presita en Kanarioj, laborista, trimonata, Nia Idealo. Nur publikiĝis tri numeroj: decembra 1935, marta kaj junio 1936. Ĝia ĉefredaktoro estis José Camino Oliva, kaj la esperanto-redaktoro estis Juan Régulo Pérez. La kialon de ĝia malapero klarigas la venonta paragrafo.

Post la granda silento, kiun diktis unue la hispana interfrata kaj poste la dua tutmonda milito (1936-1945), unuaj publikaj poresperantaj elpaŝoj okazis en La Laguna (Tenerifo). Juan Régulo Pérez, ĵus enoficigita kiel helpprofesoro en la Filozofia kaj Beletra Fakultato de la ŝtata Universitato de La Laguna, akiris permeson de sia dekanano, profesoro Elías Serra Ràfols, gvidi liberan kurson en la Fakultato, kiu normale okazis ĉiulernojare ekde komenco de 1947 ĝis 1949, kiam nova rektoro nuligis la dekanan permeson.

Sed la ĉefa famigilo, kiun donis al la tutmonda Movado la kanaria esperantismo, aldone al la starigo de oficiala instruado de

Esperanto en la Universitato de La Laguna, estas la starto de J. Régulo en 1952 kiel eldonisto en la Internacia Lingvo. Liaj eldonoj baldaŭ disfamiĝis, dank' al sia bela prezento, elstara lingvaĵo kaj fundamenta zorgo pri la disflorado de nia originala literaturo. Kelkaj libroj aperintaj en La Laguna, originale verkitaj en Esperanto, estis tradukitaj al etnaj lingvoj; unu el ili, La vivo de la plantoj de D-ro Paul Neergaard, jam al ok. Kaj ĝuste en 1969, la pasinta kongresjaro, la libroj de J. Régulo, familiare konataj sub la marko STAFETO, atingis la jubilean numeron 75, kies titolojn registras la kvara katalogo presita de tiu eldonisto. La lasta titolo elirinta el STAFETO havis la ordinalon 93-an! En 1988 UEA transprenis la eldonistan stokon kiu restis en La Laguna, post la emeritiĝo de Profesoro Régulo Pérez.

Sed ĉar intereso pri la kuroj ĉesis, S-ro Régulo daŭre gvidis kursojn, unue en kadro de kultura societo kaj poste de ŝtataj Politeĥnika Lernejo kaj Liceo de La Laguna kaj Komerca Lernejo de Santa Cruz, ĝis 1955. Ĉar tiuj kursoj estis bone vizititaj, Direktoro de Eksterfakultataj Kursoj de la Universitato, profesoro José Ortego Costales, je peto de S-ro Régulo konsentis organizi kursojn de Esperanto, sonde aŭ eksperimente, en eksteroficiala kadro, ekde fino de 1955. La nombro da lernantoj kaj la intereso montriĝis tiel kontentigaj, ke je propono de pioniro profesoro Jesús Maynar Duplá, kun apogo de profesoro Elías Serra Ràfols, ambaŭ tiam dekanoj, kaj de rektoro profesoro Antonio González, instruado de Esperanto estis unuanime oficiale starigita de la universitata estraro, en la Instituto pri Lingvoj de la Universitato de La Laguna, la 7an de decembro 1963, kie ĝi daŭris ĝis la malapero de la Instituto en 1981 pro buĝetaj kialoj. Laŭ la nombro da lernantoj, preskaŭ ĉiam Esperanto rangis trialoke inter la kvin lingvoj instruataj en tiu Instituto. D-ro Régulo estis ĝia profesoro. La katedron de Esperanto en La Laguna honoris diversaj konataj esperantistoj per prelegoj al ĝiaj gelernantoj. Inter ili, inĝeniero Jan R. G. Isbrucker, prezidanto de la Akademio de Esperanto, nederlandano; profesoro



Gaston Waringien, prezidanto de la Akademio de Esperanto, franco; instruisto Ernfrid Malmgren, Honora Prezidanto de UEA, svedo; D-ro Tadros Megalli, ĵurnalisto, egipto, ktp.

Por koherigi la esperantistaron, la 16an de februaro 1957 okazis fondkunveno de Esperantista Societo de Tenerifo (mallonge: ESTO), kiu nun havas iom pli ol 100 kotizantajn membrojn kaj kiun sinsekve prezidis José Roberto Vivas, Angel Pombrol Hernández, Juan Régulo Pérez, Nicolás Pérez Alvarez, Ramón Rodríguez Peña, Manuel Manteca López, Antonio Ferrer Hervás, Antonio Suárez Rodríguez, Leandro Trujillo Casañas, José Palmero Pérez, Juan Martín Hernández, Jorge García de La Cuesta, Carmen Rodríguez Hernández kaj Francisco José Dávila Dorta. Ekde sia fondiĝo, UEA, kies membro estas ESTO, ĉiam registris Delegitojn en la Insularo.

En 1958 kaj 1959, Esperantista Societo de Tenerifo eldonis du presitajn ekzemplerojn de sia «Rondiranto». La tiel estigita esperantista atmosfero de La Laguna estis bazo por nomigi, en januaro 1961, straton de la urbo «Dr. Zamenhof». La 26-an de aprilo 1982 alia strato de la urbo rivicevis la nomon «Esperanto». La Societo propagandis la aferon per ekskursoj kun prelegoj al multaj komunumoj de Tenerifo, samtempe aktive rolante en la urba medio, ekzemple per kunlaboro al la tradiciaj surstrataj flortapiŝoj de la Corpus Christi-festo.

Izolaj esperantistoj troviĝis kaj daŭre troviĝas en la Insularo. En Icod (Tenerife), notario Manuel Manteca López gvidis kursojn en kadro de loka kultura societo. En Las Palmas, ĉirkaŭ 1957-1960, funkciis Universitata Esperanto-Rondo, kies animo estis Oscar Yanes Miranda. En La Palma izoluloj nun troviĝas triloke. Iam kaj tiam sin anoncis aliaj en El Hierro, Lanzarote aŭ Fuerteventura. Sed neniam ie, ekster La Laguna, estiĝis daŭremaj kernoj dum la lastaj jaroj.

En 1969 okazas la 29a Hispana Kongreso de Esperanto, kie partoprenis 275 kongresanoj.

Inter 1976 kaj 1980 oni gvidas kursojn en lernejoj, liceoj kaj Universitato

En 1982 ESTO atingas sian 25an jubilean jaron. Ekde tiam oni intensigas prelegojn, artikolojn en gazetaro, programerojn en radio kaj televido, same kiel kursojn en lernejoj, kulturaj centroj kaj Oficiala Lernejo pri Lingvoj en Santa Cruz de Tenerife.

Kaj nun en 1991 ni celebras ne nur la 51an Hispanan Kongreson de Esperanto, sed ankaŭ la unuan Internacian Omaĝon honore al Profesoro Juan Régulo Pérez, liveron de la Premio "Klara Silbernik" al sia edzino Carmen Rodríguez Hernández, kaj la Unuajn Lirikajn Esperantajn Festojn.

Eble ni ne laboris forte, eble la atingoj estas malmultaj kaj negativaj, certe, sed «eĉ guto malgranda, konstante frapante traboras la monton granitan».

ESTO

LA LAGUNA, HUMANISMA SKIZO

Oni povus taksi facilan taskon verki pri La Laguna. Tiu apenaŭ kvincentjara urbo posedas mirinde konservitajn arĥivojn. Eble ni opinias, ke skribi pri urbo tia estas "kudri kaj kanti" (hispana proverbo kiu enhavas ideon pri "facileco"), sed la afero ne estas tiom facila, ĉar skribi pri la Historio de la Laguna estas same kiel skribi pri la Historio de la insulo Tenerife. Jen la kialo:

La "Tre Nobla kaj Tre Lojala Urbo San Cristobal de La Laguna", historie parolante, estas la insulo mem laŭ politika kaj administra vidpunktoj, ĉar ĝi estis elpensita ek de ĝia propra origino kiel centra urbo de nepre memstara regiono, kerno de kompakta unueco. Do, la historio de Tenerife estas la historio de La Laguna de l' urbo ĝis la insulo. Longe post ĝia fondiĝo komencis malaperi tia unueco, ĉar iom post iom kreskadis periferiaj malproksimaj urbetoj kiel Santa Cruz, El Rosario, La Orotava, kaj tiel plu. Kaj tio estas la skizo pri la vera historio de La Laguna.

Ni ne celas verki pri La Laguna kiel Urbo, kio sendube estas temo grava kaj nediskutebla, sed kiel loĝejo de lagunanoj. Ĝia publika vivo ĉies estas; sed domoj, preĝejoj, stratoj, eĉ ankaŭ ŝtonoj, havas propran vivon. Ili nin parolas pri homoj kaj kutimoj, kaj tion ni konsideras la plej interesan historion por kuriozuloj.

Estinteco

La fruktebenaĵo de La Laguna, neniam estis loĝejo de indigenaj gŭanĉoj, almenaŭ en tio kiu koncernas la nunan urbon.

La praloĝantoj preferis por vivi, la krutaĵon, kaj loĝis en ravinkavernoj, kiuj tiacele estis pli taŭgaj ol la altebeno. Por miri la malnovajn loĝejojn, oni bezonas transpasi la nunajn urbolimojn kaj iri al Santa Cruz tra la ravino "Barranco de Santos"; al Rosario, trans Geneto kaj la krutejo de San Isidro, kie troviĝas la kvar kavernoj de Anea (unu el ili estis la dormoĉambro de la reĝoj de la proksima Valo de Güimar). La ebenaĵo eble estis nur fermita paŝtejo kaj portransira loko, ofte vizitata pro tio ke ĝi estas facile atingebla perpiede.

Pro tia facila alireblo okazis tie la unuaj bataloj inter la invadantoj kaj la indiĝenoj, la unua fojo okaze de la supreniro de la Kapitano Alonso Fernández de Lugo, kun sia armeo, de Añaza (Anjaza, hodiaŭa Santa Cruz de Tenerife) ĝis la ebena Aguerre ("La Laguno" ĝuanĉlingve), apud la laĝeto el kiu prenis tian nomon la nova urbo. La ĝuanĉa Mencey (Tribestro) Ben-Ĥomo de Taoro kaj aliaj kuraĝaj ĝuanĉoj (kvankam ili estis nur pacaj paŝtistoj) iris por defendi sian teritorion kontraŭ tia invadanta armeo, je la komenco de majo de 1494. Tiu unua batalo okazis en tiu loko en kiu hodiaŭ troviĝas la nuna preĝejo de Gracia.

La milito estis akra kaj senĉesa kontraŭ la nordaj flankoj de la insulo. Ĝia ekfino okazis en la memorinda batalo de "La Matanza de Acentejo". Tie, la ĝuanĉoj mortigis preskaŭ la tutan hispanan armeon,

Unu jaron poste revenis Fernández de Lugo, kaj denove batalis kontraŭ la ĝuanĉoj en La Laguna, eble la 25-an de julio de 1495. Tiu batalo okazis en la ravino kiu transiras proksime al la Plaza de San Cristobal kaj la Ermitejo de Gracia. Tiun ermitejon oni komencas konstrui la 25-an de julio, en kiu "La Sinjoro estis servita, okaze de la tago de San Cristobal, estu gajnita tiu insulo, per la kristanaj konkerantoj, al ĝiaj nekredantaj loĝantoj".

Sed tiu batalo ne estis la lasta, kvankam per ĝi la hispanoj sekurigis definitivon venkon. Pereis en tiu milito la tribestro de Taoro, Ben-Ĥomo. Sia frato Tingŭaro estis mortigita de iu fikana-



CALLE UNAS DE ORO LA LUGAR
DANLA



PLAZA DEL ADELANTADO (II) LA PLATA

JORGE DAVILA

490

riano, kiu antaŭ ne longe prenis nomon Pablo Martín Buendía, ĉe la deklivo de San Roque nur kelkcent metrojn de la nova Universitato de La Laguna.

Posteulo de Ben-homo estis Ventor kiu daŭrigis la rezistadon en la Norda parto de la insulo ĝis la kapitulacio kiu okazis en Los Realejos fine de tiu jaro. La gŭanĉoj ankoraŭ bataladis kelktempe sensukcese kontraŭ la hispanoj.

La armeo, kiu venis nur por atingi bonan salajron, foriris. Restis tie nur tiuj kiuj venis por fariĝi terposedantoj. Kelkaj el ili konstruis siajn domojn en la Ebenaĵo de Aguere, pro la fertilega tero kaj la abundo da akvoj.

Tiam, ili celebris en tiu loko la unuan Feston de "Corpus Christi" (Korpo de Kristo), dum la somero de la 1496-a jaro, per improvizita altaro, sub tegmento farita de arbobranĉoj. En tiu loko poste oni konstruis la unuan preĝejon de "La Concepción" (Koncipiteco). Unu jaron poste, la 9-an de julio de 1497 komenciĝas la oficiala ekzistado de la eta urbo. En tiu tago la Adelantado (Antaŭsendito de la Hispanaj Reĝoj) nomumis la ses Urbokonsilantojn kaj la du Juĝistojn. Ili kune estis la unua Insul-Urbodomo, kaj la ĵusnaskiĝinta vilaĝeto nomiĝis "Villa de San Cristóbal", kvankam pri Villa (urbo) ĝi havis preskaŭ nenion.

Dum la unuaj jaroj nenio antaŭvidigis la estontan disvolvigon. Ĉiu invadisto prenis kultivterpecon laŭvole. Ankaŭ la grundo por konstrui la novan urbon estis je libera dispono. Pro la proksimaj kamparoj, la unuaj loĝantoj serĉis terpecojn najbarajn al la preĝejo de la Koncipiteco. Ili komencis konstrui iom malorde, en alteto apud laguno kiun formis pluvoj kaj montdevenaj akvoj. Tiu ĉi monteto protektis ilin kontraŭ la oftaj vintraj inundoj. En 1497 estis konstruitaj en tiu altaĵeto nur "du aŭ tri domojn faritajn el pajlo" apud tiu ankoraŭ ne finita preĝejo honore de l' Virgulino de la Koncipiteco.

La Adelantado elektis por si malproksiman lokon, ĉe la alia pinto de la ebenaĵo. De sia nova hejmo ĝis la Preĝejo estis longa


distanco. Li ankoraŭ ne pensis pri estonta urbo, kaj meze de tiuj kampoj oni instalas la stalojn kaj aliajn bestojn. Ĝuste kie nun elstaras eleganta, la Katedralo. La ĉirkaŭanta arbaro rapide malaperis hakita, ĉar arboj estis riĉeco, kaj novaj grundoj estos frukto-dona kamparo necesa por terkultivi kaj havi paŝtejon por bestoj eĉ ankaŭ legomojn kaj grenojn por kovri la ĉiamajn hejmajn bezonitaĵojn.

Norde de la Preĝejo estis vasta zono el marĉo, la fama laguno, kie la pluvaj akvoj restadis. Ekstere estis kelkaj fontoj. Iom post iom tiu laguno malpligrandiĝis kaj finfine malaperis en 1837, kiam la Comandancia de Ingenieros altigis la fundon kaj ĝin drenis.

La montoj kiuj ĉirkaŭas al La Laguna estis kovritaj per densa arbaro, sed ankaŭ rapide, la plejmulto el ili oni forhakis por akiri lignon kiel hejman brulmaterialon eĉ ankaŭ por novaj pecoj, terkulturi, ŝipkonstruado, sukerfabriko, kaj manufakturoj de peĉo kaj karbo kaj multaj aliaj aferoj hodiaŭ apenaŭ imageblaj.

La tiama loĝantaro estis ne multe pli ol cent ardevenaj homoj. Kaj tiu numero kreskis malrapide ĉar la plimulto preferis loĝi en pli mildaj veteroj. Jen pro kio la nova Cabildo, en sia sesio je la 3a de februaro de 1498, ordonis al ĉiuj najbaroj de la insulo, alveni en la urbon kaj komenci konstrui iliajn domojn en templimo da 15 tagoj, aŭ ili perdos ĉiujn siajn posedaĵojn. Tion la Cabildo kelkfoje ripetis, kio montras al nin, sufiĉe klare, malemon por hejmkonstrui en tiu loko.

Nur post la jaro 1502 kreskis la loĝantaro kaj la estraranoj planis fari urban strukturon logikan, laŭ la kutima uzo en hispanaj urboj. La Cabildo strekumis planon pligrandigante la urbon sude, per rektangulaj domlokoj, kaj orte strekitaj stratoj, de la preĝejo de "La Concepción" ĝis la domo de la Adelantado. La 24an de aprilo de 1500 la Regimento ordonis ne konstrui pli da domoj en la Supra Urbo (Villa de Arriba), kaj se iu ajn deziras konstrui, li tion faros nur de la "Hospitalo Sanktspirito ĝis la suba parto".



PLAZA DEL ADELANTADO (III) LA LAGUNA.

JORGE
BRILLA

v. 90



Laŭ nia opinio, la Adelantado pensis pri harmonia urbo, rektaj stratoj, bone distribuitaj placoj, kun Granda Placo ("Plaza Mayor") kiel tiuj de la kastiliaj urboj, kaj de tiam li forgesis la "Villa de Arriba" kaj protektis la disvolviĝon de la suba parto, per tiom granda emo ke ĝi ŝajnas esti ne normala. Bonvole rigardu:

Oni diras, ke tiu Adelantado loĝis unue ĉe la Preĝejo, kaj enamiĝis je bela virino. Poste ŝi edziniĝis kun viro kiu estis familio aŭ protektata de la Klerikoj. Li iĝis amase ĵaluza kaj senpova antaŭ tion, terure koleris kontraŭ ŝi kaj la pastroj, kaj forlasis sian unuan domon kaj konstruigis alian en la suba parto.

Li ordonis strekumi longegajn rektajn stratojn sed farigis strangan angulon en tiu strato kie situis sian novan domon, por neniam plu vidi nek la domon de la belulino nek la Preĝejon de la pastroj.

Tio estas nur bela rakonto Kio okazis estas certe pli simpla afero. La Antaŭsendito estis militisto: por rigardi la urbeniron kaj ankaŭ la maron, li konstruigis sian nuran domon en La Laguna, proksime ravinon ĉe la supra parto de la deklivo kiu alkondukas al Añaza (Santa Cruz de Tenerife). Nu, bone, la proksima ravino malhelpis kvadratigi placon kontraŭ stratojn. La domo bezonas havi fasadon "rigardante la vojon kiu alvenas de la maro" kaj la Granda placo -en kiu la soldatoj viciĝos kaj kamparanoj vendos siajn fruktojn ktp- estos situata kontraŭ tiu fasado, ĉar ĉe la malantaŭa parto de tiu domo estus nur stulteco. La pozicio de la placo estis, do, kondiĉita tiom de la propra loĝejo de l' Adelantado kiom de tiu ravino. La nura logika solvo estis anguligi kelkajn stratojn por atingi la Placon ortlinie, rektangule. El ĉiuj eblecoj, ĉi tiu solvo estis sendube la malpli malbela.

La posta disvolviĝo estis iomete pli rapida. En la jaro 1515 loĝadis tie 500 familioj (plimalpli 3000 homoj) kaj estis devige translokigi la stalojn for de la urbo. Rapide kreskadis la nombro de preĝejoj kaj ermitejoj, la plejmulto el ili ĝis nun konservataj. Oni alportis akvon per tubaro ĝis la Supra Urbo (Villa de Arriba).


Precipe portugalaĵaj metiistoj alvenis al tiu nova urbeto "San Cristóbal" donante tiamaniere rimedojn por satigi primarajn bezonojn de la loĝantaro ĉar alporti materialojn el Hispanjo aŭ Portugaljo estis malfacile pro malabundo da mono. Sed loĝantaro kreskis kaj en tiuj tempoj la Cabildo (Insula Korporacio) kreis postenojn por la unua oficiala Kuracisto kaj apotekisto. Ankaŭ Gramatik-katedro.

En 1561 la loĝantaro estis 7.220 personoj. Sed poste, la tiea loĝado fariĝis ne deviga, kaj la disvolviĝo haltiĝis. En 1805 ĝi havis entute nur 9.672 najbarojn. Dum La Laguna kreskis malrapide, la insul-loĝantaro multobliĝis rapide. Tio estis administran defion por la stagnanta Ĉefurbo insula.

En 1817 la urbo entenis 1061 domojn. El ili 178 estis de gravegaj personoj kaj aristokratoj. Sed la havenurbo, plej bone dirite, la fiŝkaptisturbo Santa Cruz de Tenerife komencis jam esti grava, kaj iom post iom La Laguna endormiĝis en siaj laŭroj. Ankaŭ aliaj urboj, ekzemple Garachico kaj La Orotava, iĝis riĉaj kaj gravaj. Finfine tiu brila historio de La Laguna ekfinaĝis kiam ĝi malobeis al la Provinca Deputitaro. Tiam La Laguna perdis ĉian rolon en la insulara vivo. Kiam oni kunigis la Supran kaj Malsupran Urbojn jam estis tro malfrue. Tio estas sendube gravega leciono por antaŭvidi futuron.

Estanteco

Ek de tiam La Laguna bezonis retrovi sin. Unue, oni konsideris ĝian gravecon el la vidpunkto de ĝia pasinteco, kvazaŭ ĝi povus pluevivi dank' al siaj memorindaĵoj. Sed de ne multaj jaroj, ĝia laca koro komencis elirigi novajn fortojn. La Universitato revivas, kiel ankaŭ multege da industrioj, negocoj kaj kulturaj eventoj. La loĝantaro denove multobliĝis senhalte. La turistoj ĝojas vidante nun preskaŭ urbegon, kiu kvankam grandparte tute nova, ankoraŭ konservas memorindaĵon de sia pasinteco. Nun



PLAZA DEL ADELANTADO (V) LA LAGUNA
JOSÉ
OSVILA — y 90

loĝas ĉi tie preskaŭ 200.000 personoj, kaj denove, la Fluĝaveno "Los Rodeos" atingas gravecon kiel insulara interkomunikejo.

Estonteco.

Tiu graveco de la Laguna, tria insula urbo post Las Palmas kaj Santa Cruz de Tenerife, antaŭvideble jam ne malpliigoŝ, pro tio ke ĝi estas ne diskutebla Universitata Urbo kaj rolas ĉefe kiel insulara kulturcentro.

Ni povas tion konstati promenante tra la stratoj apud la Universitato, Episkopejo, Longa Vojo ("Camino Largo") kaj tiel plu. Tie vi trovos multege da gestudentoj kiuj sin preparas por la novaj teknikaj profesioj, kiel estas Informadiko, Astrofiziko, Naturaj Sciencoj, Matematiko, Juro, Farmacio, Biofiziko, kaj multaj aliaj.

Ankaŭ la ĉirkaŭaĵoj, kelkaj el ili mirinde belaj, havas promesplenan estontecon, kiel tiuj de Geneto, Valle Guerra, Teji-na, Punta del Hidalgo aŭ Taco. La novaj tempoj donos al La Laguna, Auditoriojn, Muzeojn pri sciencoj kaj teknikoj, hotelojn, kongresejojn kaj gravajn ejonjn por multdiversaj aranĝoj. Tio kaj ĝia oportuna lokiĝo inter la havena ĉefurbo, la fruktodona kaj pejzaĝe belega norda flanko de l' insulo kaj ĝiaj mirindaj ĉirkaua-ĵoj, kun la apuda interinsula fluĝaveno, alportos al ĝi sendube estontan rolon, eĉ pli gravan, en la insulara vivo.

Fco. Jose Dávila Dorta

"Estiĝo kaj destino de La Laguna". Elías Serra Ráfols.

"Ĝenerala Historio pri la Kanariaj Insuloj" A. Millares Torres.

"Granda Vortaro Espasa-Calpe". Eld.Espasa-Calpe SA

"Historia kaj Monumenta Gvidilo pri La Laguna" Alejandro Cioranescu.

"Kantarhistorio". José Viera y Clavijo.

"Kanariaj Insuloj, pentritaj de Ella du Caine kaj priskribitaj de Florence du Caine"

Rakontoj de malĵunuloj, persone aŭskultitaj Fco.José Dávila Dorta





JUAN REGULO PEREZ KAJ ESPERANTO

En 1931 deksepjara Juan Régulo Pérez ekkonis Esperanton: li komencis ĝin studi ĉe S-ro Antonio Torres, majorka instruisto, kiu alveninta en Santa Cruz de la Palma serĉe de konvena klimato por sia sano kunigis ĉirkaŭ si areton da junuloj entuziasmitaj pri la ideo de tio kion Esperanto reprezentis kaj povus iam esti.

Kiam en 1933 li unuafoje enposteniĝis kiel Unuagrada Instruisto en la vilaĝo Tazacorte, siavice li formas propran aron da lernantoj kaj, de tiam, la kontribuo a la disvastigado kaj plibonigado de Esperanto estis unu el liaj plej gravaj celoj.

Post la fino de la enlanda milito, li translokiĝis al Tenerife kaj atingis licencion pri Klasika Filologio en la Universitato de La Laguna, al kiu li restis alligita kiel profesoro ĝis sia emeritiĝo. Solida lingvistika klereco -havigita de sia studado- same kiel vasta, instrua laboro kiel profesoro pri klasikaj kaj romanikaj lingvoj helpis lin funde studi Esperanto, kaj lia kunlaborado sur tiu ĉi kampo favoris lian eniron en la Akademion, al kiu ekapartenas en 1954.

Lia esperantista agado ne limiĝas tamen je la scienca kampo, ĉar ekde la komenco li antaŭenpuŝas nelacigeblan, kvazaŭ militeman taskon favore al la Movado: kune kun aliaj samideanoj li fondis en La Laguna la Esperantistan Societon de Tenerife -ESTO-, en kiu li diversmaniere laboris ĝis sia elekto kiel Honoran Prezidanton en 1969.

En 1946, sub la titolo "Esperanto" li gvidas monografian kurson en la Universitato, kiun li ripetas la sekvantan jaron. Li instruas Esperanton en ĉiaj ejoj ĝis 1963, kiam -per helpo kaj interveno de eksrektoro kaj esperantisto S-ro Maynar Duplá- li atingas la enkondukon de la studobjekto Esperanto en la instruado de la Instituto pri Lingvoj, dependa de la Universitato. De tiam ĝis 1981, li gvidis la instruadon de la lingvo kaj lian klasĉambron vizitadis centoj da lernantoj, kiuj plejparte enviciĝis en ESTO'n kaj kunlaboris disvastigi la esperantistajn idealojn. La kutima vehiklo diskoniga estis la ĉiujaraj ekskursoj, kiujn la Societo organizis al diversaj vilaĝoj de la insulo okaze de la Zamenhofa datreveno. Tie, en ejo alpruntita de la regantoj, Juan Régulo faris informan prelegon pri Esperanto kaj ĝiaj celoj. Li ankaŭ klopodis kaj atingis, ke la Magistrato de La Laguna donis la nomon "Zamenhof" al strato hazarde paralela al tiu nomata "Catedral", kie Juan Régulo loĝas.

Sed lia eble plej spektinda kaj konata kunlaborado -en kaj ekster Hispanujo- estas la kreo de Stafeto, la eldonejo kiu tiom kunagis por la disvastigado kaj progreso de altkvalita esperanta literaturo, kies graveco por la movado estis eĉ aferstudo ĉe prestiĝaj esperantistoj.

Ne mankis tamen malfacilaĵoj kaj obstakloj sur la vojo de ĉi nelacigebla esperantisto: Kanarioj staras malproksime de ĉiuj lokoj, instruista salajro ne estis alta kaj li havis kvar filinojn kaj hipotekon; dum multaj jaroj do, lia ĉeesto al la internaciaj kongresoj dependis de lia genio kaj tiu de lia edzino por alfronti la elspezojn. Li povis ĉeesti en sian unuan kongreson -Bolonjo, 1955-dank' al la malavareco de la tiama venezuela konsulo en Tenerife, S-ro Roberto Vivas, esperantisto kaj amiko kiu pruntedonis sumon redonendan, sen pagodato, per libroj eldonitaj de Stafeto; kiam, post registara ŝanĝo en Venezuelo la konsulo ekŝiĝis kaj reiris en sian landon, Juan Régulo plue sendis librojn al li ĝis la fino de sia ŝuldo.

Post kiam li partoprenis en internacian kongreson kaj persone konatiĝis kun tiuj kiuj ĝis tiam estis nur senvizaĝaj korespondantoj, ne plu estis facile rezigni la ĉiujaran ĉeeston kaj tiel, por viziti Kopenhagon la sekvantan jaron, li vendis la lignon aĉetitan por fari la ŝutojn de sia hejmo. Kelkajn jarojn, tamen, li ne povis translokiĝi kaj devis limigi sian partoprenadon en la movadaj taskoj je intensa korespondado kun personoj el la tuta mondo, kio ĝisnune neniam estis interrompita.


Stafeto, aliflanke, ne estis negoco sed ideo kaj, kvankam ĝi kutime funkciis sufiĉe bone, estis periodoj en kiuj ĝi ne atingis sin memfinanci.

Stafeto, kursoj en la Universitato, personeco same kiel historiaj kaj lingvistikaj verkoj de Juan Régulo faris el ĉi tiu lontana urba La Laguna internacie konatan lokon, kvazaŭ Mekkon por esperantistoj el la tuta mondo, kiuj krom fari turismon dum kvar



dek jaroj vizitadis la domon de la strato "Catedral". Ĉi tie okazis en 1969 Hispana Kongreso de Esperanto kaj denove hodiaŭ la hispanaj esperantistoj kuniĝas en ĉi tiu urbo ĉirkaŭ tiu ĉi homo kiu ĝin faris internacia.

Cetere, la laboro de Juan Régulo por Esperanto estas agnoskita kaj rekompencita: li estis membro de UEA-Komitato inter 1959 kaj 1974, membro de UEA-Komisiono por Internacia Ekzameno inter 1961 kaj 1980, apartenas al grandnombraj societoj kaj institucioj hispanaj kaj eksterlandaj, gvidis kursojn en pluraj internaciaj someraj universitatoj okaze de kongresoj, estis elektita Honora Membro de UEA en 1984 kaj kiam, okaze de sia emeritiĝo, la Universitato de La Laguna decidis al li dediĉi omaĝ-libron, la tutmondaj esperantistaj kunlaboraĵoj estis tiel multnombraj kaj altkvalitaj, ke oni devis destini por ili kompletan volumon. Tio estas la unua fojo, ke Esperanto -objekto de studado, same kiel diskoniga vehiklo de scienca sciado- preterpasas la limojn de sia



samideanaro kaj disvastiĝas sur ampleksan intelektan medion, tiamaniere atingante la rekonon kiel sciencan kaj kulturen lingvon.

Kaj nune, sub la titolo "Rikolto", jam estas preta la eldono de liaj verkoj en Esperanto, frukto de l' laboro de amikaro: Gaston Warinĝien, Renhard Haupenthal kaj Reto Rossetti kompilis kaj prizorgis la tekstojn, la eldonon transprenis Gersi Alfredo Bays-eldonisto de la revio "Fonto"- kaj Peter Oliver desegnis la kovrilon. Grandioza omaĝo pri sesdekjara dediĉado al ideo.

VERKARO DE JUAN REGULO PEREZ

- 1936 - La mirinda arbo "Garoé". Nia Gazeto 3. 1936 10 (34), p. 7
- 1937 - Enrique Larreta: La rabia hundo. (Trad.) Literatura Mondo 7. 1937 1, p. 22-23.
- Ramón del Valle-Inclán: La ribelestro. (Trad.) Nia Gazeto 4. 1937: 3 (39), p. 5.
- 1944 - Iluziismo kaj materialismo. Malgranda Revuo 2. 1944; 3, p. 24-27.
- 1946 - Kanariaj Insuloj. Malgranda Revuo 4. 1946 2, p. 10-15.
- 1947 - Uzado de familiaj nomoj ĉe hispane parolantaj popoloj. Esperanto 40. 1947: 504, p. 153-154.
- Kiel la Kanariaj Insuloj eniris la historion. Malgranda Revuo 5: 1947 3, p. 14-18.
- 1948 - La sklaveco en la Kanariaj Insuloj kaj ties sekvoj. Internacia Kulturo 3. 1948 9, p. 10.
- Famaj kanariaj vegetaĵoj. Malgranda Revuo 6. 1948 2, p. 3-7.
- 1949 - Ĉu Esperanto disdialektiĝos? Boletín 1. 1949: 11, p. 2-3.
- Hispanidaj neologismoj en Esperanto. Esperantologio 1. 1949/55: 1, p. 59-72.
- 1950 - Faŭsto I [Recenzo]. Boletín 2. 1950: 3 (15), p. 122-123.
- Ĉu vere troviĝas hispanismoj en Esperanto? Boletín 2. 1950: 5 (17), p. 136.
- Pensoj pri libro. Esperanto 43. 1950: 531, p. 10.
- Pri la signifo de la signo &. Esperanto 43. 1950: 536, p. 90.
- Pri la Eŭropa Olimpo. Malgranda Revuo 8. 1950: 4, p. 1-5.
- Nova vulkano naskiĝis. La Praktiko 14. 1950: 5/6 (151/152), p. 60-62.
- Nefermita letero al idista amiko. Al S-ro Pedro Marcilla Ferrus, Barcelono. Progreso 26. 1950: 4 (160), p. 64-65.
- Eĥo el la Kanaria Arĥipelago. Voĉo de Islando 2. 1950: 1, p. 8.

- 1951 - Naŭlingva etimologia leksikono [Recenzo]. Boletín 3. 1951: 6 (30), p. 263.
- La lingvoj de Ameriko. Boletín 3. 1951: 7 (31), p. 267.
- Diccionario Esperanto-Español. [Recenzo]. Boletín 3. 1951: 11 (35), p. 311.
- El la Kanaria Insularo. La Palmo, lando de kontrastoj. Esperanto 44. 1951: 543 (2), p. 39-41.
- Kion ĝis nun Ameriko ne donis. Malgranda Revuo 9. 1951: 2, p. 2428.
- 1952 - KREDU MIN, Sinjorino! [Recenzo]. Boletín 4. 1952: 6 (42), p. 379.
- Bagatelaro. [Recenzo]. Boletín 4. 1952: 7 (43), p. 387.
- Hidalgo. Studaĵo pri vorthistorio. Esperanto 45. 1952: 4 (557), p. 113-117.
- "Non omnis moriar". Postuma omaĝo al Cezaro Rossetti. Heroldo de Esperanto 28. 1952: 7 (1159), p. 3.
- Kolomano Kalocsay ĉe la limo. Malgranda Revuo 10. 1952: 4, p. 115-117.
- Estiĝo kaj rolo de la iberiaj lingvoj. Sennacieca Revuo 80. 1952, p. 33-38.
- 1953 - La karnavalo kaj la somnambulino. [Recenzo]. Boletín 5. 1953: 2 (50), p. 455.
- Rui Barbosa (1849-1923). [Recenzo]. Boletín 5. 1953: 3 (51), p. 467.
- Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto. [Recenzo]. Boletín 5. 1953: 10 (58), p. 535.
- Consideratio nominis. Gramatikaj difinoj. Boletín 5. 1953: 12 (60) p. 552-553
- Klasifo de Esperantaj temoj. [Recenzo]. Scienca Revuo 5. 1953; 1/2 (17/18), p. 77-79.
- Kapitalismo, komunismo, milito kaj demokratio. Sennacieca Revuo 81. 1953, p. 22-28.
- Studoj pri personaj pronomoj. [Recenzo]. Boletín 6. 1954: 11 (71), p. 108.
- Jugolasvio kaj ĝiaj popoloj. [Recenzo]. Bol. 6. 1954: 12 (72), p. 114.
- Kazoj en Esperanto. Esperanto 47. 1954: 581 (4), p. 115-117.
- Alvoko al pure Esperanta glosaro. La Progresanto 16. 1954: 5, p. 33-36.
- Pri lingvodiverseco; pri penso kaj lingvo. Sennacieca Revuo 82. 1954, p. 20-25.

- 1955 --Ankoraŭ pri la "Suplemento" de la "Plena Vortaro". Boletín 7. 1955: 3 (75), p. 146-147.
- Invado de akridoj en Kanarioj. Dumonata sturmado kaj plagado al la arĥipelago. Esperanto 48. 1955; 592 (3), p. 84-87.
 - Enciklopediistoj en Kanariaj Insuloj. La nica literatura revuo 1. 1955/56: 2, p. 47-51.
 - Mito kaj scienco pri Atlantiso. Sennacieca Revuo 83. 1955: p. 48-51.
- 1956 - Vocabulario Español-Esperanto. [Recenzo hispanlingva]. Boletín 8. 1956:12 (96), p. 352-353.
- Pri liceco de novaj prepozicioj. Sennacieca Revuo 84. 1956, p. 47-49.
- 1957 --Babilo pri Stafeto. En: J. D. Applebaum: Jozefo. Drama poemo en kvar aktoj. La Laguna: Régulo 1957. p. 107-111. (Bel-literatura eldonserio. 10.); repr. en: Reinhard Haupenthal: La Stafeto-libroj. Saarbrücken: Iltis 1986, p. 16-20.
- Kanaria Legendo. Boletín 9. 1957: 4 (100), p. 35.
 - Kanarioj, vojkruciĝo de kontinentoj. Boletín 9. 1957: 6 (102), p. 55.
 - Al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto. Nefermita letero al S-ro Luis Hernández. Boletín 9. 1957: 10 (106), p. 96.
 - Dracenoj ĉe pentristoj de la 15a jarcento. Kontribuo al la solvo de arthistoria problemo. Norda Prismo 3. 1957; 3, p. 123-128.
 - Tabako. Kontribuajo al vorthistorio. La Progresanto 19. 1957: 10, p. 75-77.
- 1958 - De la Hesperidinaj ĝis la Kanariaj Insuloj. Sciencaj Studoj. Kopenhago 1958, p. 75-82.
- Antaŭinformo pri preparata lernilo de Esperanto. Boletín 10. 1958: 4 (110), p. 134.
 - Misteroj, mitoj kaj faktoj. Eseo pri la disfame legendaj nomoj de Kanariaj Insuloj. La nica literatura revuo 3. 1957/1958: 5 (17), p. 194-200.
 - Sankta Brandano, sirena insulo. Sennacieca Revuo 86. 1958, p. , 8-11.
- 1959 - Prologo. En: Baldur Ragnarsson. Ŝtupoj sen nomo. La Laguna: Régulo 1959, p. 11-17 (Stafeto. Beletraj Kajeroj. 1.).
- Postparolo. Leksikologia komentario. En: Tibor Sekelj: Nepalo malfermas la pordon. La Laguna: Régulo 1958, p. 203-212 (Stafeto. Popularsciencia eldonserio. 2.).
 - [Respondo al enketo]. Esperanto 52. 1959: 639 (2), p. 26.

- Kiujn librojn oni prefere legas? Heroldo de Esperanto 35. 1959; 6 (1284), p. 2.
- 1960 - "Lando" de Libereco, Egaleco kaj Frateco. En: Memrorlibro eldonita okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof. Londono: UEA, CED 1960, p. 70.
- Deklaro pri "Nepalo". The British Esperantist 56. 1960: 663, p. 352.
- Vocabulario Español-Esperanto [Recenzo]. Esperanto 53. 1960; 653 (4), p. 75-76.
- [Recenzo: C. Vaz Ferreira: Fermentario]. La nica literatura revuo 6. 1960/61; 32, p. 78-80.
- 1961 - Ĉu Nepalo aŭ Nepalujo? Esperantologio 2. 1959/61: 2, p. 145-151.
- La punkto de danĝero. En: La Zamenhofa Esperanto. Simpozio pri -ata/-ita. La Laguna: Régulo 1961, p. 3-16. (Stafeto. Movado. 2.)
- Tragedio en la universo. [Recenzo]. Scienca Revuo 12. 1961/62: 3/4 (47/48), p. 129- 132 .
- 1962 - El nia leterkesto. The British Esperantist 58. 1962: 681, p. 258.
- 1963 - Lingvistiko, bilingvismo, poliglotismo kaj Esperanto. Monda Kulturo 1. 1962/64: 3, p. 92-94.
- Nefermita letero al MEM-paroĥano. Sennaciulo 34. 1963; 8/9 (699/-700), p. 62.
- 1964 - Fundamento de Esperanto. [Recenzo]. Boletín 2. 1964: 7. (143), p. 10.
- Ne kiel Meier! [Recenzo]. Boletín 2. 1964; 10 (146), p. 12-13.
- Lingva deontologio. Sennacieca Revuo 92. 1964, p. 39-43.
- 1965 - Apendico. En: José Hernández: Martín Fierro. Argentina Eposo. Trad. de Ernesto Sonnenfeld. La Laguna: Régulo 1965, p. 283-288.
- Antaŭparolo. En: Teodoro S. Švarc [t.e. Soros Sĉwartz]: Maskerado ĉirkaŭ la morto. Nazimondo en Hungarujo. La Laguna: Régulo 1965, p. 1-5.
- Vintraj aktivaĵoj de la esperantistoj de Tenerifo. Boletín 3. 1965: 12 (148), p. 11-13.
- Esperanto, moderna lingvo. [Recenzo]. Boletín 3. 1965: 13 (149), p. 11-12.
- Hazardo kaj elekto. Naskiĝo kaj evoluo de "Stafeto". The British Esperantist 61, 1965: 715, p. 167-170.
- La libro de teo. [Recenzo]. Esperanto 58. 1965: 716 (7), p. 132.
- La hispana kontraŭ la prakanariaj lingvoj. Monda Kulturo 2. 1965/66: 10, p. 1-6.

- La sorto de la homaro. [Recenzo]. Monda Kulturo 2. 1965/66: 10, p. 21 .
- 1967 - S-ro D. Juan Régulo Pérez. [Intervjuo]. Boletín 5. 1967: 163, p. 12-13.
- Unesteno. [Recenzo]. Boletín 5. 1967: 28 (164), p. 16-17.
- Vocabulario Español-Esperanto. [Recenzo]. Esperanto 60. 1967: 739 (6), p. 97.
- 1968 - Freŝa mateno. [Recenzo]. Boletín 6. 1968: 31 (167), p. 20-21.
- 1969 - Eldonista danko. En: Leander Tell: Estiĝo de la tero kaj de la homo. La Laguna: Régulo 1969, p. 103.
- Esperanto en Kanarioj. XXIX Hispana Kongreso de Esperanto. La Laguna 1969, p. 20-24.
- La Laguna invitas vin! Boletín 7. 1969: 36 (172), p. 3.
- Kanarioj: Ponto inter kontinentoj. Esperanto 62. 1969: 763 (6), p. 104-105.
- 1971 - La Fondaĵo Esperanto kaj la Biblioteko de HEF. Boletín 9. 1971: 47 (183), p. 18.
- Luis Hernández (1906-1961). Heroldo de Esperanto 47. 1971: 14 (1513), p. 1, 3.
- Saluton al K. Kalocsay 80-jara. Hungara Vivo 11. 1971: 3, p. 3.
- 1972 - Eroso kaj Psiĥa. The Britiŝ Esperantist 68. 1972: 780, p. 198-199.
- Kiam vi ne plu ekzistos... The Britiŝ Esperantist 68. 1972: 789, p. 394-395.
- 1973 - Pío Baroja kaj lia romano "La arbo de la sciado". En: Pío Baroja: La arbo de la sciado. El la hispana trad. Fernando de Diego. La Laguna: Régulo 1973, p. IX-XVIII. (Stafeto. Belliteratura serio. 31.)
- Vizito de la siroko. The Britiŝ Esperantist 68. 1973: 796, p. 147-149.
- La libro kiel kultura fenomeno. Scienca Revuo 103. 1973, p. 1-12.
- 1974 - Poezio kaj eldonisto. Hungara Vivo 14. 1974; 3, p. 10-11.
- 1975 - Esperanto en Perspektivo. [Recenzo]. Boletín 13. 1975: 72 (209), p. 21-22.
- Doña Bárbara. [Recenzo]. Boletín 13. 1975: 72 (209), p. 22-23.
- 1976 - Letero kaj poemo de Zamenhof omaĝe prezentitaj al Prof. G. Waringhien en lia 75a vivo-jaro. Horizonte 1. 1976; 5, p. 97-99.
- 1977 - Animoj-libroj, homoj-mondo. Esperanto 70. 1977: 862 (10), p. 163-164.
- Ĝis frenezorando. [Pri "Inuk"]. Esperanto 70. 1977: 863 (11), p. 185.

- 1978 - Transponti la baraĵojn. Pripensoj post Rejkjaviko kaj Ĥado. Horizonto 3. 1978: 17 (5), p. 97-98.
- 1982 - Pri kio (mal)entuziasmas Juan Régulo Pérez. [Pri: "La litomiŝla tombejo"]. Esperanto 77. 1982: 916 (4), p. 68-69.
- 1983 - [Recenzo: E. de Kock: Japaneskoj]. Bona Espero 1983. 3.
- 1984 - Stafeto: Homaranisma kultur-aventuro. Fonto 5. 1984/85: 51, p. 5-14.
- Alia vidpunkto pri la pacmovado. Horizonto 9. 1984; 49 (1), p. 6-8.
- Deklaro omaĝe al Prof. D-ro Ivo Lapenna. (Kun Paul Neergaard.) Horizonto 9. 1984: 54 (6), p. 142-143.
- 1985 - Dokumentoj ĉirkaŭ la morto de Lazaro Zamenhof. En: Li kaj ni. Festlibro por la 80a naskiĝtago de Gaston Waringhien. Ed. Reinhard Haupenthal. Antverpeno, La Laguna: tk (1985), p. 299-311.
- Esperanto en La Laguna. Boletín 37. 1985; 272, p. 20.
- Magiaĝo de l' vortoj. El Popola Ĉinio 1985: 8 (323), p. 44-45.
- El tia ŝtof' ni estas, kiel niaj songbildoj. Monato 6. 1985; 121, p. 24-25.
- 1986 - [Recenzo pri Camilo losé Cela: La familio de Pascual Duarte]. Fonto 6. 1986: 65, p. 29-33; parte represita en Boletín 38. 1986: 277, p. 17.
- Frazeologiaj sintagmoj en la Internacia Lingvo. Esperanto 79. 1986: 967/68 (7/8), p. 129-130. Repr. en: La Mondo. Monata organo de CEL. 1988: 9, p. 15-16.
- Al Juan Régulo. [Intervjuo]. La Mondo 1986: 10/12, p. 87-89.
- 1987 - Amble kun William Auld. En: William Auld: En barko senpilota. Plena originala poemaro. Pisa: Edistudio 1987, p. 25-31.
- Lazaro Zamenhof komandoro de la Hispana Reĝa Ordeno de Izabela la Katolika. En: Centjara Esperanto. Ĉapecó: Fonto 1987, p. 215-224.
- Kiel redakti kolektivan libron en Esperant(uj)o? Esperanto 80. 1987: 979/80 (7/8), p. 128-130.
- Esperanto kaj Papiamento: la plej simplaj gramatikoj. Heroldo de Esperanto 63. 1987: 3 (1774), p. 1, 3; 4/5 (1775/76), p. 7.
- Cent jaroj de Esperanta frazeologio. [Resumo]. Horizonto 12, 1987; 72 (6), p. 127-128. Plena teksto en: Memolibro... (1989).
- Nenia danĝero. Monato 8. 1987: 10, p. 4; ankaŭ en: Iltis-Forumo 1. 1989; 1, p. 17-18.
- 1988 - Henri Vatré, homo el masiva oro. Speciale por Henri Vatré 80-jara. Genève: Iltis 1988, p. 60-62.
- Antaŭnomoj de D-ro Zamenhof. Monato 9. 1988: 6, p. 4.

- 1989
- Cent jaroj de Esperantaj frazeologismoj. Memorlibro pri la internacia jubilea Esperanto-konferenco Cent Jaroj de Esperanto-kulturo. Red. Klaus Perko. Rodovre: Eld. Perspektivo 1989, p. 48-60.
 - Kiel naskiĝas la lingvoj. El Popola Ĉinio 1989: 12 (375), p. 48-50.
 - Panoramo kaj trezorminejo. [Recenzo pri: W. Auld: La fenomeno Esperanto]. Esperanto 82. 1989: 998 (2), p. 32-33.
 - La dualismo de judaj antaŭnomoj. Monato 10. 1989; 5, p. 22-23.
 - Prezento [al Nia Fundamento sub lupeo] de G. E. Makkink. [Ankoraŭ ne aperis en presita formo].
 - Lingvohistoria pritrakto super la nomoj de la Kanariaj Insuloj. [Ankoraŭ ne aperis en presita formo].

"NIA IDEALO"

La 17an de decembro de 1989, Juan Régulo Pérez donacis al Esperantista Societo de Tenerife siajn esperantajn revuojn kiujn li kolektis dum sia esperanta vivo. Mi iris al lia hejmo kaj ordigis tiujn revuojn. Inter ili mi trovis tri gazetojn sub la nomo NIA IDEALO; ili estis eldonitaj en Las Palmas. Tiuj gazetoj estis de trimonata apero, en hispana kaj esperanta lingvoj kaj sub laborista ideologio. La unua ekzemplero aperis dum decembro de 1935, la dua kaj tria dum marto kaj junio de 1936, la postaj naciaj okazintaĵoj mortigis tiun gazeton. Mi pensas ke nun estas bona momento por ke la nuna hispana esperanto movado konu ĝin, ĉar kvankam humila, apartenas a la esperanta kanaria historio kaj eĉ montras unuajn artikolojn verkitajn de nia Profesoro Juan Régulo Pérez (n^o 2, marto 1936, "Kostumoj de Kanariaj Insuloj", kaj n^o 3, junio 1936, "La mirinda arbo Garcé" (devas diri, "... Garoé"), mi pensas ke la laboro de Juan Régulo en tiu ĉi gazeto estas pli ampleksa, ĉar en la unua ekzemplero preskaŭ ĉiuj artikoloj estas sen subskribo. Nur tio ja valorigas la diskonigon de tiuj eldonaĵoj kaj eĉ povas esti interesa esplora laboro. Ne multaj nomoj subskribas la diversajn artikolojn sed ilia diskonigo povus klarigi nian historion. Jen tiuj interesaj koneroj kaj nomoj:

En 1-a ekzemplero:

Redakcia adreso: Josefo Camino, Triana 11, Las Palmas, Canarias.

Administrejo: Daniel Galán, Botas 12, Las Palmas, Canarias, Hispanio.

Tip. Editorial PABLO IGLESIAS.

Artikoloj en hispana lingvo:

El Esperanto. Apreciaciones de un neófito. Nicolás Padrón.

Artikoloj en esperanto:

Belega Esperanta revo. Antonio J. Torres.

Alvoko. Johano del PESO.

En 2-a ekzemplero:

Nova adreso: Esperanto; Apartado 215, Las Palmas, Kanario, Hispanio.

Aperas adreso de la presejo pro ŝanĝo de sidejo, «Los talleres de la Editorial Pablo Iglesias se trasladan al Puerto de la Luz, en la calle Franchy y Roca 22, esquina a 29 de Abril».

Artikoloj en hispana lingvo:

Carta de un minero del Donbas. Eugenio Malahecev.

Carta de un maquinista Sovietico. F. Harin .

Desbabelización del mundo "ni fosu nian sulkon". F. Dasi Llopis.

Artikoloj en esperanto:

Rekomendo de novulo. D.G.F.

Kostumoj de Kanariaj Insuloj, J. Reg.

Pri la kamparano. M. T. Lérída-provinco.

SUR POSTENO

Organo central de
IPE

Aceptamos suscripciones
de España y América

Unua jaro
N-01

Aperas trimonate

December
1935

Kiuj ni estas kaj kion ni celas

PROSPEKTO

Sub signo de unecfrotino ni naskigas, kaj konsekvencan al ĝi ni agos. Uneca fronto, komuna agado, perspektiva proleta strevo: ĉi tiuj celdevoj. Ni agnoskas ĉi tiujn principojn, ĉar ni scias ke ĉia amasa movado estas klasa movado kaj ke esperantismo ankau estas tiu.

Sed ni, simile al la maljunaj burĝoj, esperatistoj-idealitoj, ne kredas, ke Esperanto estas la tutmonda panaceo, la universala elekstro, kiu kvazaŭ disvolvas ĝeneron la interopulan fratigon. Ne, Ni scias, ke ĉia intenco de alproksimigi, kaj samtempe ne kunporti en si la renverson de la nun ekzistanta kapitalisma sociordo, nur estas laŭna rimedo: vana sonĝo.

Ni scias, ke la nulgilo de la lingvaj vandoj neniam ekstermos alian pli fortan baron; nome, tiun, kiu dividis la homojn je du klasoj: burĝoj kaj proletoj, uzurpantoj kaj uzurpatoj.

Pro tio ni ne rigardas Esperanto kiel celon, sed kiel ilon. Ni scias, ke en ĉi tiu klasto, kie al ni estas limigitaj la kulturrimoj, Esperanto taugas al ni nenaaŭtoregule bone, ni faras ĉi tiu lingva ĉi estas esperantitoj.

Por la plenumo de ĉi tiuj ĉi proleta devoj, ni faras ĉi tiu la gvidrolecion (akceptita) de la 2a IPE Kongreso. Firme apogita sur tiuj principoj, ni elpikas, Ni salutas ĉiujn proletajn kaj progresmajn Esperanto-organizojn kaj Esperanto-gazetojn kaj petas de ĉiuj konsilioj kaj kritikoj.

Jen du kioj ni estas, ĉi, ĉi, kion ni celas.

Tutmondaj klasa fratuloj: Ni, la iniciatintoj kaj elfandantoj de ĉi tiu unua per-kaj por-esperanta gazeto en nia arĉipelago, ankoraŭ estas mallortaj, malnutritaj; sed ni multgigas, ni kredas, ĉar ni estas obstinaj, perani, en unu celon: atingi, nek unua aliron al dikantado de niaj konkeroj por la celo:

Per Esperanto por Monŝtrevolucio!

P. E. K.

Recentemente hemos leído en una revista española, la imposibilidad que representa para sus editores relacionar gran cantidad de personas de todas las profesiones que lo han solicitado, con otras de las mismas actividades de la Unión Soviética. Esta imposibilidad, con nuestro gusto lo constatamos, ha desagrado.

La misión de PEK (Correspondencia Proletaria por medio del Esperanto) es ligar a los trabajadores, tanto manuales como intelectuales, salvando el obstáculo de los idiomas. El servicio de traducción de nuestro periódico, no sólo se limita a traducir en Esperanto las cartas que se nos envían, sino también las hará llegar a su destino, utilizando las organizaciones de PEK que existen en la U. S. Como es natural, las respuestas en Esperanto serán traducidas al castellano y enviadas al correspondiente iberoamericano.

PEK no solamente funciona en la U. S. En otro lugar de nuestro

periódico publicamos una lista de las organizaciones nacionales de este servicio. A todas esas direcciones se puede dirigir quien lo desee, bien directamente escribiendo en Esperanto, o por nuestra mediación. El fin de este organismo es crear una extensa red de correspondencias, que al mismo tiempo que fortifica la solidaridad proletaria internacional, permite la adquisición de conocimientos profesionales, literarios, etc.

En las islas Canarias, son bastantes ya las colectividades que corresponden. Entre ellas contamos con tres sindicatos. El de Trabajadores de la Enseñanza ha nombrado incluso una comisión dedicada de lleno a ello. Una peña ciclista de Madrid, recibió no hace mucho tiempo su primera respuesta de un grupo de ciclistas de MINSK (U. S.). Una interesante carta de un compañero preso de Ján enviada a ARKANGEL (U. S.), ha sido publicada en el periódico PRAVDA SEVERA de aquella localidad y enviado un ejemplar a su autor.

Estas solamente son débiles

Nuestro periódico

Desde nuestro primer número hemos querido marchar sobre una base firme. 23 suscriptores mensuales de una peseta y los suscriptores anuales en Canarias garantizarán la publicación de nuestro periódico trimestralmente. Ahora bien, nuestro deseo, muy lógico por supuesto, es el de hacerlo aparecer al menos cada dos meses. Para ello pedimos la colaboración de los camaradas miembros o simpatizantes de IPE de España y de todos los trabajadores en general.

Cada número contendrá interesantes traducciones de otros boletines periódicos en castellano. Con ello pretendemos hacerlo atractivo para el no esperantista, possibilitando conseguir suscriptores fuera de nuestros medios. Además de los trabajos en castellano acerca del Esperanto y los problemas esperantistas, publicaremos en cada número como mínimo una página en Esperanto dedicada a informar a los esperantistas de otros países sobre la situación económica, luchas, perspectivas, etc. del movimiento obrero español y americano. Nuestro deseo es hacer nuestro periódico interesante para todos.

Con esta facilidad, nuestro trabajo no debe limitarse a adquirir solamente suscriptores esperantistas. Dado el poco precio de la suscripción anual, creemos no muy difícil para los camaradas liberar sus nombres. SIGA SUSCRIPCIONES, que possibilitarán su aparición bimensualmente.

Muchos camaradas peninsulares recibirían pagueros contestando diferentes ejemplares. Nosotros esperamos que hagan todo lo posible por abonar a los camaradas pudientes, quienes en el futuro recibirán el periódico directamente y nos giren el dinero con una lista de los suscritores, donde consten sus nombres y domicilios.

muestras de lo que puede llegar a ser este servicio organizado por nuestro periódico. Si alcanzar no tiene límites. A este efecto, recordáremos la participación activa que tuvieron los técnicos y especialistas alemanes en la realización del primer Plan Quinquenal soviético. Por medio de la organización alemana aportaron sus conocimientos técnicos, siendo su ayuda valiosa. Nuestro servicio, como es natural, es completamente gratuito. Solamente pedimos a los futuros correspondientes escribir lo más concisamente posible, suprimiendo todo lo innecesario. Las preguntas que a su vez se le hagan por los camaradas a quienes se dirijan, como es lógico se está en el deber de responderlas.

